



Tra la Mondo

Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA-LA-MONDO-ESPERANTO-SEMAS-SIAJN-BONAJOJN-
 PLIFACILIGAS-LAKOMERCAJN-INTERRILATOJN-KONIGAS-
 LA-INDAJN-ELTROVOJN-KUNHELPOS-POR-ANSTATAVI-
 DE-FRUKTODONA-PACO-LA-SANGAJN-BATALADOJN-
 KIUJ-DISSIRAS-HOMARON.



Pillet

Alegorio speciale verkita de Sinjoro Pillet, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Roman lernejon post ricevo de 1° granda premio.

Jara abono : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abono : 2.25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

| | Paĝo. |
|--|------------------|
| Nuntempaĵoj: Ĉe Algeŝiras, (Hispanujo) de Pro Bord; la enterigo de Lia kardinala Moŝto Perraud, de Fino O. Prudent, (Francujo) | 129 ^a |
| Bibliografio: Principoj de decimala klasigo; kun apliĝo al Esperantismo de S ^o G. Chavet; mekaniko | 130 ^a |
| Diversaj sciencoj: La plej norda instituto de la mondo, de K. Gutke, (Svedujo). | 131 ^a |
| Artista paĝo: P. P. Rubens, de Van der Biest-Andelhof (Flandro) | 134 ^a |
| Pri Esperanto: Kroniko kaj Bibliografio; Organizado de Esperanta Ekspozicio de Steleto | 136 ^a |
| Kuriozaĵaj Kutimoj en ĉiuj landoj: La Karnavalo de Fino Yv. Joulin (Francujo) | 138 ^a |
| Teatra Fakoj: La teatro de l' naturo: La elsputoj de Vezuvio, de Gr ^o Albert Gallois (Italujo) | 140 ^a |
| Diversaĵoj: La Vivado de Teoplantisto en Hindujo, (sekvo) de A. T. Simper (Anglujo) | 141 ^a |
| Felietono: La Torento el Saŭmo, de Daniel Lesueur, esp. de J. Flourens (Francujo) | 142 ^a |
| Alĝeriaj pejzaĝoj, de Bledamanto (Alĝerio) | 144 ^a |

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S^o Brunet, 59, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO al:

Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn, plenalore.

Oni povas ankoraŭ ricevi « Tra la Mondo » de l'unua numero.

Reabono — Grava avizo.

Oni bonvolu sendi la koston de l' abona renovigo tiamaniere ke ĝi alvenu antaŭ la sendo de l' numero sekvonta la lastan pagitan, aŭ almenaŭ KAJ NEPRE skribi antaŭ la jus dirita templimo, por sciigi ke oni daŭrigas la abonon. Neplenumo de tiu kondiĉo okazigos la nericevon de la revuo.

EN LA ESPERANTA GAZETARO.

Kelkaj kunfratoj plendas pro la malfacileco de sia tasko; unu jam tre konata, kvankam apenaŭ naskita, bedaŭras la malgrandan nombron de siaj abonoj kaj la mankon de reklamoj, kiuj solaj povus ebligigi vivon de multe da niaj revuoj, kiuj havas nesufiĉe da abonintoj; alia, ankaŭ tre konata, kaj kiu baldaŭ pliampleksiĝos, petas manuskriptojn; kaj kiom da aliaj estas en la sama situacio: nesufiĉe da abonoj, nesufiĉe da ŝtofo por plenigi interesamaniere ĉiun numeron, kaj tute ne da reklamo! Kaj oni vidas revuojn eĉ malnovajn, kaj kies eldono devus esti pro tio tre regula, aperi... kiam ili povas, sendube pro manko de ŝtofo; kaj alia, pro la sama kaŭzo, sciigi ke ĝi maldikiĝos ĝis plej bonaj tempoj.

Tiu situacio ne estas ĝojinda kaj devus pripensigi. Kaj tamen oni vidas, iafoje, personojn revantajn pri novaj kaj ankoraŭ aliaj revuoj.

En la lasta numero de « Ruslanda Esperantisto » S^o Devjatnin talenta verkisto, proponas fondon de granda tutmonda societo por eldono de grandega revuo, celanta atentigi skeptikulojn kaj malamikan gazetaron pri Esperanto.

Aliaj havis la saman ideon; sed tio kio karakterizas la projekton de S^o Devjatnin, estas ke li, laŭ sia propra diro, ne havas planon!

Unu el liaj antaŭuloj S^o Romano Frenkel kiu, li, havis planon, eĉ bonegan, kalkulis ke por fari ion vere trafontan la

celon, estus necese elspezi sumon tiel grandegan, ke mi preferas ne ĝin citi.

Cetere tuj kiam li konis revuon pli modestan, sed kies plano ja ebligis kun la tempo plenumon de ĉiuj postuloj, li tuj komprenis ke la sola kaj vera eldona societo por revuo estas fidela abonantaro, kies fideleco estas ŝuldata al la intereso de la revuo.

Nu estas jam kelkaj esperantaj revuoj, kiu estas ĝermo eblaj de organoj similaj al la plej indaj naciaj, se oni lasas ilin vivi. Kial riski mortigi tion, kio kostis longajn jarojn da penado kaj malavaraĵajn elspezojn. Oni memoru tion, kio diris S^o J. Jamin, unu el niaj plej malnovaj kaj konataj kunfratoj. « Ni ne konkurencu unu la alian. » Tio pli ke, pro la indiferenteco de la plimulto de Esperantistoj, tiagrande revuo ne vivus pli ol la ĝisnunaj, kaj ĝia malsukceso estus tiom pli pereiga por Esperanto ke oni estus pli atentiginta la malamikojn pri ĝi.

Kaj mi ne parolis pri la malfacilaĵoj materialaj rezultantaj de direktado de la revuo per komitato devige internacia.

S^o Devjatnin estas poeto, grandtalenta poeto. Sed aliaĵoj estas verki versojn kaj okupiĝi pri tutmonda revuo, precipe kiam oni havas nenian planon pri ĝi.

A. M.

Dia luksa eldono.

Ni ricevis la sekvantan leteron de aboninto je la luksa eldono: « Estas domaĝe ke vi ne presis la 5 unuajn numerojn sur luksa papero ĉar por tiuj, kiuj bindigos vian revuon tiel interes... kaj belege ilustratan, la numeroj de l'unua volumo ne estos samaj. Mi estos do kontenta sciigi pri la represo de la 5 unuaj numeroj lukspapere. Antaŭe mi monoferas por tiu represo ».

Alia skribas.

« Kial vi ne represas la 5 unuajn numerojn ? »

La kaŭzo estas tre simpla. Tia eldono estas multekosta.

Nu, unue ni havas ankoraŭ multajn ekzemplerojn de l' 5 unuaj numeroj, kaj due, ni ricevis nur 4 petojn por luksaj eldonoj kaj nur 5 por tuboj! Tio, iamaniere, ĝojigis nin ĉar ĝi montras ke la simpla eldono estas juĝata jam tre bela kaj sufiĉa, kaj ankaŭ ke, krom maloftaj esceptoj, la revuo alvenas ne difektita.

Sed, en tiaj kondiĉoj, estas tute neeble represi la unuajn numerojn. Eĉ ni devos malgrandigi la nombron de l' luksaj numeroj.


Oni do rapidu se oni ilin deziras.

NIA VENONTA NUMERO.

Centjara festo de l' Bavaruja reĝolando, de Karl Zacherl (Bavarujo). — La Milana ekspozicio, de J. Mezzini (Italujo). — Milito kaj paco, sprita teatraĵeto de Samuel Meyer (Francujo). — La fortikaĵo de Schlisselbourg, Rusujo, de D^o Morgan (Rusujo). — Bonfaremeco, de Baronino von Süttner (Aŭstrujo), esp. de D^o Hanauer (Germanujo). — La elmi-

grantoj, de S^o Legoffre (Francujo). — La vivado de Teoplantisto (Hindujo), de A. T. Simper (Anglujo). — Pri Esperanto, de Steleto. — La fama bohema violonisto Kocian, de Svaĉina (Bohemujo). — La decimala klasigo, de G. Chavet (Francujo). — Miksaĵoj. — Parada marŝo je l' honoro de D^{ro} Zamenhof, kavaliro en la honora legio, de J. Proharza, bohema instruisto.

NUNTEMPAĴOJ



LA URBADOMO, KIE KUNSIDAS
LA KONFERENCANOJ.



STRATO EN ALĜESIRAS.
RIGARDANTE LA DELEGITOJN.

Ĉe Algésiras.

Algésiras (Aljeziras'o) estas hodiaŭ la vorto elparolata de la tutmondo civilizita. Algésiras estas la mistera fonto, el kiu fluos eble la bonfaranta *Paco*, eble ankaŭ la sanga *Milito*. Sed kio kaj kie estas tiu ĉi malgranda historia urbo?

Sur la bordo de la blua Mezamaro, sub la Hispana hela suno, troviĝas Algésiras trankvilema. Belaj hoteloj, plaĉaj somerdomoj estas semitaj antaŭ sabla golfeto, dum blanka domaro supreniras la flankon de verda monteto. Oni povas pensi, ke la loĝantoj deziris ekvidi la grandegan britan ŝtonegon *Gibrattar* (*Jibrattar'o*), kiu gardas zorge la *Heraklean* markolon. Ili volas ankaŭ rigardi, malproksimege, la bordon malofte videblan de antikva Afriko.

La alta enlanda urbo prezentas originalan kaj iom orientan spektaklon: mallargaj stratoj malbone pavimitaj, malaltaj dometoj, kies verdaj fenestroj havas feran kradon. Kiam la nokto forpelas la tagon, junuloj sin kubutapogintaj babiladas tra la baroj fenestraj (kvazaŭ en konfesejo) kun estaĵoj nevideblaj, sed tre aŭdeblaj pro virinaj ĝojaj ride-

goj. La Hispanoj tradukas tiun ĉi Andalusian kutimon per la jenaj vortoj: *pela la pava* (Li sen plumaro igas la meleagrinojn). Ĉie multnombraj estas la amuloj, kiuj deziregas senplumigi la meleagrinojn!

De l' mateno kaj la tutan tagon, ĉiuspecaj vendistoj senĉese trairas la strataron kriante, anoncante laŭtege kaj diversmaniere: *panecillos* (bulkojn), olivojn, fiŝojn k. t. p. Inter ĉiuj oni aŭskultas la siblan vokon: *Agua!* (akvon!) de l' akvisto, kiu akompanas malbelan stoikan azenon ŝarĝitan de bareletoj. Samtempe kaprinoj aŭdigas sonoriletojn, meleagroj pepiegas, gurdoj trompetas aŭ ploras. Jen estas la ariaro, la kantaro, la notaro, kiu pli aŭ malpli agrable, divastiĝas tra tiu ĉi suda urbeto.

Nokte, la *sereno* (maldormisto) kun sia lanterno, kriadas la horojn kaj la temperaturon. Li protektas la dormon de la urbanoj samtempe ĝin malhelpante.

Aliparte, la nazo ne povas ĵaluzi la orelojn. Ĉar el la kradaĵoj fenestroj eliras manĝaĵaj kaj kuiraj odoroj, inter kiuj oni povos rimarki ajlajon kaj gadaĵon.

Nun malfermu la okulojn. Sur la placon alvenas la

promenantoj kaj promenantinoj. Tiuj ĉi lastaj, la virinoj andalusaj, perfekte meritas sian mondfamon. Senĉapelaj ili enmetas unu floron en sian hararon: rozkoloran geranion, ruĝan rozon, bluan jasmenon. Vizaĝe, ambaŭ okuloj jetas eksterordinaran brilon kaj similas al du nigraj diamantoj. Longaj movemaj okulharoj vivigas ankoraŭ la rigardon kaj metas bluetan ombreton, kvazaŭ veleton, kiu plidolĉigas la brulantan flamon de tiuj ĉi okuloj, kiuj komplimentojn postulas.

Tia estas la teatro, ĉe kiu ludas novaj aktoroj: maljunaj gravaj Sinjoroj kun kamentubaj silkaj

ĉapeloj kaj longaj nigraj jakoj. Ili, ĉiutage, iras kaj reiras en antikvaj kaleŝoj, dum ĉiulandaj ĵurnalistoj, kiel abelaro, zumas kaj flugas ĉe la telegrafejon. Solene, moke, barbulaj Morokanoj vestitaj per blankaj ŝtofoj atendas pacie la finan momenton de la dramato eŭropa. Ĉar nenio ĝenas la kvietecon de Mahometanoj murmurantaj: *Ĝi estas skribita!*

Algésiras! poeta vorto, suna nesto, mirinda lando de brunaj virinoj kaj de lertaj kontrabandistoj, kunvenejo de famaj internaciaj diplomatoj, ni benos vin se vi naskos la Pacon!

Pro B.

La enterigo de lia Kardinala Moŝto Perraud.

Unu el la plej altaj kaj belaj figuroj de la franca episkoparo ĵus malaperis: lia Kardinala Moŝto Perraud, episkopo de Autun, Chalons kaj Macon. Estu al mi permesata skribi tie ĉi kelkajn detalojn pri lia admirinda vivo.

Naskita en Liono la 7^{an} de Februaro 1828, li estis tre rimarkinda kaj brilega lernanto en la liceoj Saint Louis (*Sankto Ludoviko*) kaj Henri IV (Enriko la IV^a) kaj en la Normala Lernejo, kie li estis samtempe kiam Taine, About, Weiss, Sarcey, kiuj fariĝis pli malfrue granduloj en nia literaturo.

Nur dudekjara, li estis jam akceptita kiel profesoro kaj instruis brilege en Angers'o, kiam subite li forlasis Universitaton por fariĝi pastro.

Doktoro de teologio, li instruis dekjare historion en seminario de Saint-Louis, kaj montris tiel profundan sciencan kaj altajn kapablojn, ke li estis nomata profesoro en Sorbono.

Dum la milito je 1870, kaj la Pariza revolucio (La Commune) lia konduto estis admirinda. Mi povus citi multajn ekzemplojn kie estas pruvitaj liaj noblaj sentoj, liaj kuraĝo kaj sindono.

En 1874, li estis sanktigata kiel Episkopo de Autun. Neniam li volis akcepti sidejon pli brillan aŭ pli gravan.

Rimarkita pro lia elokventeco kaj la libroj indogaj, kiujn li verkis, li estis elektata en 1882 en la Francan Akademion, kiel posteulo al Auguste Barbier.



Kl. Morin.

Fot. en Paray.

LA AKOMPANANTARO, LA 16^{an} DE FEB^{ro}.

De antaŭe malantaŭen estas videblaj: lia Moŝto Dubourg, episkopo de Moulins, lia Moŝto episkopo de Clermont-Ferrand, lia Moŝto Petit, ĉefepiskopo de Besançon.

El liaj belegaj verkoj, mi citos nur: *Studojn pri nuntempa Irlando*; — *Parolojn je la nuntempa Horo*; — *La Patron Gratre*; — *Kardinalon de Richelieu kiel episkopo, teologisto kaj protektanto de Literaturo*; — *Verkojn pastrajn kaj oratorajn*; — *Militajn paroladojn*; — *El rilmon kaj harmonion* — kaj nekalkulablajn libretojn ĝustatempajn, laŭtadojn, kaj pastrajn leterojn.

Antaŭ aŭdantaro, lia parolo estis facila kaj simpla, kun pureco kaj klasika distingeco.

Tamen, lia aliro estis malvarma; liaj vortoj nemultaj, lia rideto tre malofta.

Liaj haroj mallongaj kaj blankegaj, liaj vangoj kavigitaj, lia ega malgraseco, liaj okuloj profundaj kaj fervoraj donis al li vidigon de profeto sankta.

Estas nepre privilegio koni tiajn virojn kaj spiri kelkfoje iom da aero saturita per iliaj altaj ecoj.

Paray-le-Monial havis tiun ĉi profiton. Nia honorata Kardinalo tre amis la malgrandan urbon kie altiris lin lia piego por Sankta Koro. Multafoje jare, li venis preĝi en sian preferan preĝejon.

Tial li volis havi tie ĉi sian lastan loĝejon.

Post unuaj ceremonioj en Autun'o, l' enterigiro fariĝis en Paray, kie pia kaj multa ĉeestantaro sufiĉis anstataŭi la tutan lukson, kiun la modesta kaj severmora Kardinalo rifuzis.

O. P., el Paray-le-Monial.

Gazetara libereco!

Mi ricevis la jenan leteron:

« Tre estimata Sinjoro,

Mi petas vin publikigi la malagrablan surprizon riceviton hodiaŭ de mi kaj, kredeble same, de mia tuta sampatrujanaro esp-sta, nome: hodiaŭ mi ricevis la okan numeron de « Tra la Mondo » sen la unua paĝo kiu, enhavanta laŭ la presita enhavo priskribon pri la Oktobraj detruoj en Ruslando, estis forŝirita. Kia malĝentila ago! Mi skribas al la rusa cenzuro, kaj mi petas vin denove sendi al mi la saman okan numeron per garantigita sendaĵo, volonte de mi pagota; sed tiun numeron fleksigu senĝene kvarone kaj enmetu en tute fermitan kaj gluitan koverton, simile al ordinara fermita letero... »

Radvan Ripinski (Rusujo).

Feliĉe ke oni anoncis, antaŭ nelonge, ke cenzuro estas forigita, en Rusujo, pri la fremdaj gazetoj! Kio estus se cenzuro ankoraŭ ekzistus!

Ni komprenas la enuon de niaj rusaj legantoj, kaj aparte de S^o R. Ripinski, kiu, tuj post la ricevo de lia abono, skribis:

« Mi bone ricevis ĉiujn sep numerojn de « Tra la Mondo » kaj vere estas ravita same de ĝia belega eksterajo, kiel pro la interesplena enhavo de tiu modela ĵurnalo... »

Duafoje la rusa cenzuro montras ke esperanta gazeto estas potenco kapabla timigi aŭtokratan regnestaron.

« T. I. M. »

Ankoraŭ pri Katalunujo.

Mi legis surprize en la lasta n^o de « Suno Hispana » la jenajn liniojn:

« Tra la Mondo ion diris en sia 5^a numero kio malplaĉis al la hispanaj esperantistoj kaj la senkulpigitoj de ĝia 6^a numero ne kontentigis la ofenditojn. »

Eble ŝajnos al tiuj, kiuj relegos la diritajn artikoletojn, ke la ŝfero ne postulis tian bruon, ĉar « Tra la Mondo » nur aludis faktojn pri kiuj estis legeble en naciaj gazetoj.

Sed mi trovas stranga ke oni elnaturigis miajn parolojn. Amike kaj ĝentile mi esprimis bedaŭrojn kaj simpatian pri ofendo farita al la hispana standardo; sed mi ne faris senkulpigitojn, ĉar neniel estis la okazo fari tian submetigon.

A. MONTROSIER.

La plej norda instituto de la mondo.

Verkita de K. GUTKE (Svedujo).

Tertremaj kaj meteorologiaj esploradoj en Riksgrensen (68 $\frac{1}{2}$ ° norda latitudo).

Antaŭ duonjaro la gazetaro mallonge informis, ke pligrandiĝos la provizora scienca instituto, kiu de du jaroj organiziĝis apud la fervoja stacidomo « *Riksgrensen* » en la sved-norvega limo. Multaj botanikistoj kaj geografiistoj vizitis tiun instituton. De tiam oni ricevis nenian sciigon pri tiu malgranda instituto en la ekstremnorda parto de Svedujo. Ĉar tiu afero interesas ne nur la sciencularon sed ankaŭ la publikon, la redakcio de la gazeto « *Dagens Nyheter* » sendis kunlaboranton al la iniciatoro kaj energia fondinto de tiu instituto *D^{ro} Fr. Svenonius*, kiu afable akceptis lin kaj detale sciigis pri ĉio, kio interesas la publikon.

En la printempo de la jaro 1903 oni fine povis aĉeti la provizorajn domojn, en kiuj estis loĝintaj la konstruintoj de la fervojo « *Luleo-Ofoten*. » En tiuj domoj oni starigis la instituton, kiun oni projektis antaŭ dekkvin jaroj. Ĉar tiuj domoj ne estis taŭgaj por tiaspeca instituto, oni ĝis nun penadis haviĝi sufiĉe da mono por plibonigi la instituton. Nun tio prosperis! La domoj estas riparitaj kaj oni povas loĝi en ili *la tutan vintron*. Oni haviĝis ĉiuspecajn sciencajn aparatojn, kaj la ekonomio de la instituto estas bona, dank' al la malavaroj donacoj de du personoj, kiuj ne volis diri sian nomon. La instituto troviĝas en la vilaĝo « *Vassijaure* » sur la suda bordo de monta lago, kiu estas longa je 6 kilometroj. La instituto estas malproksime de la stacidomo « *Riksgrensen* » je du kilometroj. La instituto kuŝas sur monto, kiu altiĝas ĝis 520 metroj super la nivelo de la maro. Okcidente oni trovas la belegan montriveron « *Kaderjock*, » cent metrojn malproksime de la instituto. Oriente oni trovas la grandegan montriveron « *Vassijock* » malproksime je unu kilometro de la instituto.

Tiu regiono favoras la celon de la instituto. La profitoj de tiu instituto estas: *unue*, la observejo havas lokon en la plej arkta regiono de Eŭropo; *due*, glaciejoj estas proksimaj; *trie*, tiu regiono favoras la meteorologiajn esploradojn pli ol aliaj regionoj; kaj *fine*, la scienculoj povas senĝene laboradi, ĉar *neniaj kuloj* troviĝas en tiu regiono.

La lasta profito certe ne estas senvalora, ĉar la instituto kuŝas en la provinco « *Laplando*, » kiu estas la plej « kulhava » kaj la plej norda provinco de Svedujo. La « *laplandanoj* » ne parolas svede, sed « lape ». La « lapa lingvo » similas je la finna kaj hungara lingvoj.

La instituto estas malavare provizita per tendoj, kaj boatoj troviĝas en la lago « *Tornetvesk* ». Sekve la scienculoj povas ekskursi en tiu regiono. Estas bonveninta ĉiu scienculo, kiu vizitas la instituton. Li rajtas uzi la sciencajn aparatojn.

Loĝejoj troviĝas kaj tie ĉiam loĝas servisto, kiu, al la gastoj de la instituto, havigas manĝaĵojn. La instituton ankaŭ nemetiistaj scienculoj rajtas viziti. Al la komitato de la instituto, la vizitontoj bonvolu raporti sian vizitintencon. Tiu komitato konsistas el la plej famaj svedaj scienculoj. La prezidanto estas *Profesoro Theel*. La ceteraj komitatanoj estas: *Doktoro Fr. Svenonius*, amiko de nia afero; *Profesoro Aurivillius*, sekretario de la sveda scienca akademio; kaj fine la tutmonde konata meteorologiisto *Doktoro Ekholm*.

En la instituto oni jam esploras la sekretojn de la meteorologio « *per drako*. » Doktoro Svenonius certigas, ke tiu instituto fariĝos la plej bona scienca instituto de Eŭropo. Dum la daŭro de tiu ĉi vintro, ĝi ricevos « sismografon » (t. e. aparato, per kiu oni registradas la tertremojn) laŭ modelo de « *Wiechert*. » Oni jam mendis ĝin kaj ĝi egalos je la sismografo, kiu troviĝas en la urbo « *Upsala* ». Multaj scienculoj de la kontinento jam atentis tiun instituton. Ĝis la regiono de la instituto transsendiĝos la ondoformaj terskuoj, kiuj venados eĉ el la « *Japana Maro* ». *Fil. Kandidato Bruno Rolf* loĝas en tiu instituto dum la tuta jaro pro la meteorologia esplorado.

Kiu ajn interesigante pri tiu afero, bonvolu skribi al la esperantisto *Doktoro Nils Ekholm*; 76 B, *Grefteuregatan, Stockholm, Suede*.

El la Stockholma ĉiutaga gazeto « Dagens Nyheter ».

Tradukis, K. GUTKE. (Svedujo).



Mina Katastrofo je Courrières.

Terura malfeliĉego jus frapis la francan mondon laboristaran. Perforta eksplodo kaj brulado en la karbaj minejoj de Courrières mortigis pli ol 1200 ministroj, faris centojn da vidvinoj, milojn da georfaj. Terurega revenĝo de la naturo kontraŭ la homa genio, kiu rabas ĝiajn trezorojn. La tutmondo civilizita partoprenis en la kortuŝeco, kiu enpenetris la francajn korojn, kaj de ĉiuj landoj kaj eminentuloj alflugas la simpatiaj atestoj.

Je l' nomo de nia legantaro, ni sendas respektan saluton al la humilaj mortintoj.

« Tra la Mondo ».

Principoj de Decimala Klasigo

kun apliko al Esperantismo.

De G. CHAVET (Francujo).

En sia 3^a cirkulero, la « Esperantista Centra Oficejo » parolis pri la ordigo de l' multaj dokumentoj jam ricevataj, laŭ la reguloj de l' decimala klasigo.

Tuj ni komprenis ke, por la grupoj kaj multe da propagandistoj, kiuj havas multajn dokumentojn ordigi, estus pleje interese koni tiujn ĉi regulojn. Laŭ nia peto, S^o G. Chavet, la konata kaj lerta Sekretario de la oficejo, bonvolis skribi la jenan artikolon, kiun nia eminenta samideano, Generalo Sebert, Prez^o de la Bibliografia Oficejo de Parizo, bonvolis revidi mem.

Niaj legantoj ŝatos kiel ni la valoron de tia kunlaborado.

I. — Ĝeneralaj principoj de Bibliografio.

En plena bibliografia katalogo, oni devas trovi respondon al du jenaj demandoj: 1^e: kiuj estas la verkoj presitaj (libroj, broŝuroj, aŭ artikoloj) publikigitaj de S^{ro} N... pri ĉiuj objektoj? 2^e: kiuj estas la verkoj publikigitaj pri ia speciala objekto, de ĉiuj aŭtoroj? La unua demando necesigas la ordigon de la titoloj de la verkoj, laŭ la alfabeto ordo de la nomoj de la aŭtoroj; la dua necesigas la klasigon de tiuj titoloj, laŭ metoda ordo, montrata en speciala klasiga tabelo.

Se oni skribas tiujn titolojn sur kartojn neligitajn kaj, sekve, facile translokeblajn, skribante sur ĉiun karton nur unu titolon, oni tiel starigas surkartan katalogon, al kiu oni povas apliki ĉiujn ajn klasigajn sistemojn, kaj kiu povas esti ĉiam plenigebla, per almeto de novaj kartoj, neŝanĝante la ordon de la antaŭaj.

Se por klasigi tiujn kartojn, oni uzas metodan sistemon, laŭ la objektoj de la verkoj klasigotaj, sistemon montratan en ĝenerala klasiga tabelo, enhavanta ĉiujn fakojn de la homaj konoj, oni povas tiel ebligi universalan bibliografian katalogon sur kartoj, en kiu, ĉiuj verkoj, pri ĉiuj objektoj, povos esti klasigataj.

Tiaspeca klasiga sistemo, kies fundamento estas la uzo de la decimalaj nombroj estis proponata, en 1873, de S^{ro} Melvil Dewey, prezidanto de la Societo de la Amerikaj Bibliotekistoj. Tiu sistemo, kiu estas tre praktika, kaj tre oportuna, multe diskonigis en Ameriko, kaj Eŭropo, kaj estis tre plenigata kaj pliperfektigata, precipe, de kiam ĝi estis uzata de la Instituto Internacia de Bibliografio de Bruselo kaj de la Bibliografia Oficejo de Parizo, kies prezidanto estas nia eminenta samideano S^{ro} Generalo Sebert. Tiuj ambaŭ fondaĵoj celas la starigon, laŭ la supraj principoj, de la universala katalogo, pri kiu ni tuj parolis, kaj por tio, ili jam kolektis pli ol 7 milonoj da kartoj. Tiu katalogo povas esti konsiderata, kiel kunmeto en unu fasko, de ĉiuj specialaj katalogoj, kiuj koncentras la diversajn fakojn de la homaj konoj; kaj aliflanke, tiuj specialaj katalogoj povas esti konsiderataj kiel partoj de la universala katalogo, en kiu ili povas esti facile enmetataj, ĉar ili estas starigitaj, laŭ la sama klasiga sistemo.

La bibliografiaj laboroj pri Esperantismo, kiujn entreprenis la Centra Oficejo estas farataj tiamaniere ke ili estu konformaj al la universala katalogo, kies parto ili estas; sekve, oni uzas, por la klasigo, la tabelojn de Decimala Klasigo, publikigitaj de la Instituto Internacia de Bibliografio. Ni intencas diri tie ĉi, kiamaniere tiuj tabeloj estis starigitaj, kaj kiamaniere oni devas ilin uzi, por la Esperanta Bibliografio. Tiuj klarigoj estos nur malgranda resumo, kaj ni ne pretendas ke ili sufiĉos, por ke la leganto povu klasigi, per ili, siajn esperantajn dokumentojn. Ili estas nur gvidilo, kondukanto, por komprenigi la principon de la sistemo, kaj faciligi la studadon kaj la aplikadon de la Decimala Klasigo. Oni trovas la plenajn tabelojn, kaj ĉiujn necesajn klarigojn, en la verko: *Manuel du Répertoire bibliographique universel*. (Institut international de Bibliographie, 1, rue du Musée, Bruxelles).

II. — Resumaj principoj de la Decimala Klasiga Sistemo.

A. — Tabeloj de la ĝeneralaj klasoj.

Oni konsideru la tuton de la homaj konoj kiel unuo, kiun oni riprezentas per la cifero 1.

Oni dividas tiun tuton, en dek grandaj klasoj, kiujn oni riprezentas per decimalaj fracioj, per la dek arabaj ciferoj 0, 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9. Jen estas tiuj dividaj:

| | |
|-----|----------------------------|
| 0,0 | Ĝeneralaĵoj. Bibliografio. |
| 0,1 | Filozofio. |
| 0,2 | Religio. Teologio. |
| 0,3 | Socialaj Sciencoj. Juro. |
| 0,4 | Filologio. Lingvoscienco. |
| 0,5 | Naturaj Sciencoj. |
| 0,6 | Aplikataj Sciencoj. |
| 0,7 | Belartoj |
| 0,8 | Literaturo. |
| 0,9 | Historio kaj Geografio. |

Per dekstra almeto de nova decimala cifero, ĉiu el tiuj klasoj povas esti dividata en dek aliaj klasoj, kiuj riprezentas centonojn de la unuo, kaj kiuj signas, ĉiu el ili, unu fakon de la supraj sciencoj.

Cetere, por simpligi, oni skribas tiujn nombrojn, forprenante la nulon kaj la komon kiuj estas antaŭ la decimala nombro, kaj oni havas ekzemple, la jenajn subdividojn de la klasoj 4 kaj 5:

| | | | |
|----|-----------------------------------|----|---------------------|
| 4 | Filologio. Lingvoscienco. | 5 | Naturaj Sciencoj. |
| 40 | Ĝeneralaĵoj. Lingvoj internaciaj. | 50 | Ĝenerala vidpunkto. |
| 41 | Kompara Filologio. | 51 | Matematikoj. |
| 42 | Angla Filologio. | 52 | Astronomio. |
| 43 | Germana Filologio. | 53 | Fiziko. |
| 44 | Franca Filologio. | 54 | Hemio |

k. t. p. k. t. p.

Ĉiu el tiuj subklasoj povas ankoraŭ esti subdividata sammaniere kaj senlime, por ke oni povu ilin apliki al pli kaj pli specialigataj fakoj de la sciencoj. Jen ekzemplo:

5 Naturaj Sciencoj.

53 Fiziko.

535 Optiko.

5357 Fiziologia Optiko.

535,75 Rolo de la retino en la vivo.

Kvankam oni forprenis la aŭtaŭnan nulon kaj la komon, tiuj nombroj devas ĉiam esti konsiderataj kiel decimalaj nombroj; sekve oni devas ilin ordigi, ne laŭ ilia vera grandeco, sed, cifero post cifero, komencante per la unua, kiel oni ordigas la vortojn de vortaro. Ekzemple: 4625 estas ordigota antaŭ 475, kaj tiu lasta, antaŭ 48 ĉar oni devas ilin legi: 0,4625; 0,475; 0,48

B. — Komunaj dividaj kaj malsimplaj nombroj.

Oni vidas ke, per tiu rimedo, oni povas starigi ĝeneralajn klasigajn tabelojn, en kiujn oni povas enmeti, klasojn tiel multajn kiel necesas, por riprezenti la plej detalajn titolojn de ĉiuj objektoj de la spirita laboroj, sen por tio ŝanĝi la jam ekzistantajn klasojn. Sed oni povas multe malpligrandigi la amplekson de tiuj tabeloj, rimarkante ke, en ĉiuj fakoj de la sciencoj, ekzistas komunaj subdividoj; ekzemple la subdividoj laŭ la materia formo de la verko (Traktato, tezo, parolado, historia raporto, lernolibro) aŭ laŭ la loko pri kiu oni parolas en la verko, aŭ laŭ la epoko, aŭ laŭ la lingvo uzata en la verko. Oni do starigis specialajn tabelojn, en kiuj oni donas klasigajn nombrojn por signi tiujn komunajn ideojn; nombroj, kiujn estas almetebaj al ĉiuj nombroj de la ĝenerala tabelo. Sed por distingi tiujn nombrojn de la aliaj, oni ilin enkadrigas, per tipografiaj signoj: krampoj, apostrofoj k. t. p. Tiamaniere ni havas malsimplajn nombrojn. Ekzemploj klarigos tiun sistemon.

La subdividoj, laŭ la *formo ĝenerala* estas montrataj per nombro komencanta per nulo, enkadrigata per krampoj. Ekzemple:

(01) montras ke la verko estas teorio ĝenerala pri... Ĉar Matematikoj estas riprezentataj de la nombro 51, teorio ĝenerala pri Matematikoj estos.

51 (01)
(05) montras periodajn publikaĵojn. Do, revuo, gazeto pri Matematikoj estos

51 (05)
(09) estas Historio de..... Do, historio de Matematikoj estos 51 (09)

Por montri la *epokon* pri kiu oni parolas en la klasigota dokumento, oni metas inter la signoj « » la nombron kiu montras la jarcenton aŭ la jaron. Historio de Matematikoj dum la XV^a jarcento estos

51 (09) «14»

ĉar la XV^a jarcento enhavas la jarojn de 1400 ĝis 1499.

Por montri la *lokon geografian* pri kiu rilatas la verko, oni uzas la nombron taŭgan inter krampoj. Ĉar la nombro kiu signas Francujon estas (44), historio de Matematikoj en Francujo, dum la XIX^a jarcento, estos

51 (09) (44) «18»

Fine, por montri la *lingvon* uzatan oni uzas la signon ' ' . Lingvo angla estas 42, germana 43, franca 44. Oni uzas tiujn nombrojn por signi verkojn filologiajn pri tiuj lingvoj. Sed se oni volas nur montri ke ia ajn verko estas verkita en tiuj lingvoj, oni forprenas la unuan ciferon 4, kiu estas la signo de Filologio, kaj oni metas anstataŭe la signon ' ' . Ekzemple, historio de Matematikoj verkita en franca lingvo estos

51 (09) '4'

kaj historio de astronomio (Astronomio estas signata 52) en Francujo, dum la XVIII^a jarcento, verkita en angla lingvo, estos

52 (09) (44) «17» '2'

Oni uzas ankaŭ *signon de rilato*, kiu konsistas el du punktoj: por kune meti la signojn de du objektoj, inter kiuj la verko klasigota elmontras rilaton. Ekzemple:

31 estas Statistikoj; 331.2, Salajroj; kaj 677, Teksa industrio. Oni do havas:

31 : 331.2 : 677

kio signifas Statistikon de la salajroj en la teksa industrio.

C. — Diversaj rimarkoj.

1. — Oni uzas la signon + por meti sur *unu* karton, la klasigajn nombrojn de multaj objektoj, kiuj estas esplorataj en *unu* verko. Tiam oni kopias multajn ekzemplerojn de tiu karto, kaj ĉiu el ili estas klasigata en unu el la klasoj montrataj de la nombroj ligitaj de la signo +


2. — Oni uzas la signon — , antaŭ nombroj kiuj montras subdividojn kiuj povas esti aplikataj al multaj diversaj klasoj. Ni vidos pli malsupre ekzemplojn de la uzo de tiu signo.

3. — Oni uzas ankaŭ la literojn de la alfabeto, por riprezenti, proprajn nomojn (personajn, geografiajn), aŭ eĉ la titolojn de la verkoj. Ni vidos ankaŭ pli malsupre ekzemplon de tiu uzo.

Daŭronta.

*Speciale por « Tra la Mondo »
de GABRIEL CHAVET (Francujo)
Sekretario de « Esp. Centra Oficejo »*

Fervoja bileto pagata laŭpeze.



Nun kelkaj amerikaj fervojaj Kompanioj pagigas la vojaĝantajn biletojn laŭpeze. La supra ilustraĵo montras vojaĝanton

Gazetaro kaj Bibliografo.

Ni salutas novan kunfraton: bulgara eldono de franca Esperanto. Povu tiu ĵurnalo ĉiam havi utilan agadon por la propagando en Bulgarujo.

« L'Espérantiste » de nun ne plu havas la tutan kronikon en du lingvoj. France estas la franca kroniko kaj la fremda, ĉar ĝi utile sciigas la nur aprobantojn; Esperante estas la fremda kroniko.

Tiu ŝanĝo donos spacon kaj ebligas enpresi denove tekstojn en Esperanto, kio certe plaĉos al la legantoj de la revuo, kiu, iam, enhavis verkojn de niaj plej ŝatataj aŭtoroj.

« Espero katolika » anoncas ke tre baldaŭ ĝi enhavos 16 paĝojn; des pli bone. Ni deziras al nia kunfrato bonan sukceson sub ĝia nova formato.

En « Esperanto », interesa artikolo de S^o Berthelot pri « Internacia mutualismo » La aŭtoro klarigas la grandajn profitojn de mutualistaj societoj kaj montras la danĝerojn, kiuj minacas la naciajn. Li opinias ke bonega baro kontraŭ tiuj danĝeroj estus internaciigo de la mutualismo.

Projekto jam preskaŭ plene ellaborita estas proponota en

sur la pezilo surskribonta lian pezon, kaj aliajn pretajn por lin anstataŭi.

kunveno de l' venonta Geneva kongreso. S^o Berthelot petas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la afero (mutualistojn kaj juristojn), bonvoli sin kunigi al li por lin helpi per siaj konsiloj kaj lumoj. La enhavo de lia artikolo montras ke li jam tre bone konas la aferon. (*Nova adreso*: Paul Berthelot, P. R., Central, Genève, Suisse).

La « Revue de l'Esperanto » havas nun 4 paĝojn kaj kostas 2 fr. (ĉiumonate).

Ĝagrene ni vidis malaperi « Holanda Pioniro », direktata sindoneme de nia malnova kunbatalanto S^o Drees Uitterdijk. Espereble liaj penadoj ne estos perditaj kaj dank' al lia bonega dissemado, naskiĝo de Esperantista Holanda Societo ne malfruos

« Esperanta Studento » (16 Upperwestbourne Villas, Hove, England) komencas novelon de Rudyard Kipling.

Pro manko de spaco ni ne povas hodiaŭ enpresi « bibliografion. » Ni havas multe por diri pri interesaj verkoj inter kiuj 2 tute rimarkindaj ĵus riĉigintaj la jam tiel riĉan Hachette'an bibliotekon.

STELETO.



Kl. Lusthof.

FLANDRA PEJZAĜO, LAŬ RUBENS.

P. P. Rubens

Originala studado, de VAN DER BIEST-ANDELHOF (Flandro).

P. P. Rubens apartenas al la tuta mondo pro la multaj ĉefverkoj per kiuj li ĝin riĉigis. Neniu pli prave ol li do meritas lokon en tiu ĉi revuo. Fidelaj je nia farmaniero, kaj dank' al la afableco de unu el niaj kleraj samideanoj, ni povas hodiaŭ enpresi tiun studadon pri la glora flandra pentristo, de flandra artkritikisto.

La 16^a kaj la 17^a centjaro estas famaj pro la alta ekflugo, kiun prenis en Belglando la artoj kaj la sciencoj. Sur la unua rango brilis la pentrarto, kiu riĉigis ĉiujn Eŭropajn landojn per siaj ĉefverkoj, kaj kiu restos por ĉiam la gloro de Flandro.

En tiu glora epoko, la plej granda, la ĉefa el la Flandraj pentristoj estis Rubens.

Petro-Paŭlo Rubens naskiĝis, verŝajne en Antverpeno, en la jaro 1577. Li ricevis sian unuan instruadon en Kolonjo, kie loĝis liaj gepatroj, kiuj estis forlasintaj Antverpenon pro la persekuto de P' tiama landestro, la duko de Alb'o. En 1588 la familio Rubens revenis en Antverpenon, kie Petro-Paŭlo servis kelkan tempon kiel paĝio ĉe Sinjorino de Ligne, vidvino de P' grafo de Lalaing.

Tiu vivo malplaĉis al Rubens pro lia liberama naturo, kiu lin instigis al la arto. Lia patrino ne pli longe kontraŭstaris lian naturan inklinton kaj per-

mesis, ke la junulo fariĝu pentristo. Lia unua majstro estis Tobias Van Haecht, ĉe kiu li ekzercadis sin en la pejzaĝa pentrarto; poste Van Noort malvolvigis liajn eksterordinarajn emojn de kolorlukso kaj instruis al li la naturan elpenson kaj la larĝan kaj multimeman pentron, dum Van Veen riĉigis lian spriton per la plej multnombraj konadoj, kiujn bezonis tiama pentristo.

Kiam Rubens estis dudek-trijara li vojaĝis en Italujon, kie li pliperfektigis precipe per la lernado de Tiziano Vecellio kaj Paŭlo Veronese. Li vizitis intersekve Venezion, Firenzon, Milanon, kaj Genovon. Ĉie estis montrata al li princa honoro; la duko de Mantuo plenigis lin je favoroj kaj fariĝis lia speciala protektanto.

La morto de lia patrino subite revokis Rubens en Antverpenon; dum lia loĝado en tiu urbo (1608) li edziĝis je Elisabeth Brant. Li fariĝis la kortega

Tre plezurege ni ricevos proponojn por daŭrigi tiun galerion el portretoj, de sampatrujanoj de l' artistoj. Ni jam ricevis interesajn ilustritajn artikolojn pri la glora rusa pentristo Veresĉagin, de Ruso; kaj la jama bohema muzikisto Kocian, de Bohemo.

pentristo de la gearĥidukoj Alberto kaj Izabelo, kaj ekpentris de tiam tiun grandegan nombron da ĉefverkoj, per kiuj li akiris la honoran nomon de « Princo de la Flandra pentristaro. » Liaj unuaj verkoj intervidigas ankoraŭ la Italan influon; sed baldaŭ li ekliberigis sin de ĝi, por proprigi al si originalan stilon, plenan je libereco kaj drama for-
teco. Pasia movado, maltimega agado brilas ĉe la kreo de lia paletro; lia koloro estas plena je varmo kaj lumo. La Malsuprenigo de Jezuo de la kruco, kiu flanke de la Altigo de l' Kruco ornamas la murojn de la Antverpena katedra preĝejo estas ĝenerale konsiderata kiel la ĉefverko de Rubens, kvankam kelkaj el liaj aliaj produktaĵoj restis pli freŝaj.

Krom en la religia fako, Rubens distingigis en la profana historia pentrarto, por kiu li, la plej ofte, ĉerpis el la Roma historio; li ankaŭ prenis subjektojn el la mitologio; li kreis faŭnojn kaj silenojn, nimfojn kaj satirojn, ĉiuj superfluantaj je bonsano kaj volupto. Kiel portretpentristo li paradis sur la unua vico; super ĉio oni laŭdas liajn proprajn portretojn kaj tiujn de liaj du edzinoj (1). *La virino kun la ĉapelo*, portreto de Heleno Fourment, kiun oni admiras en la nacia galerio de Londono, estas vera perlo.

Rubens ankaŭ pentris belegajn pejzaĝojn, familiajn, popolajn kaj kamparajn scenojn, kaj reprezentadojn el la infana vivo. Kiel pentristo de bestoj li distingigis ne pli malmulte: liaj leonoj, tigroj, ĉevaloj kaj bovoj estas penikitaj kun fiereco kaj fajro, ne perdante iom de ilia forta kaj sovaĝa naturo.

Krom ĉio ĉi, Rubens plue akiris indan famon kiel diplomato. La arĥidukino Izabelo lin sendis en Holandon (1623), por incitila Estraron al la renovigo de la dek du jara interpaco. Li estis invitita ĉe la kortego en Madrido, kie la reĝo de Hispanujo lin altigis al la nobelaro, honoro kiun faris al li ankaŭ Karolo I^a, reĝo de Anglujo, al kiu li estis sendita por fari pacproponojn. Liaj prudentaj kaj lertaj penadoj ebenigis la maloportunan vojon, kaj honorplena interkonsento estis subskribata en 1630.

Dum la dek lastaj jaroj de sia vivo (1630-1710) Rubens ne plu estis tiel fruktodonanta en grandegaj pentraĵoj, sed li desegnis por la grandaj

Antverpenaj presejoj multe da titoldesegnaĵoj kaj portretoj. La pentraĵoj, kiujn li produktis dum tiu periodo, tute ne estas malsuperaj al siaj antaŭaj verkoj, nur lia maniero ŝanĝis; li fariĝis pli maltime-
ma en sia esprimo, pli ol neniam li metis fortan movadon super kvietan kaj dolĉan belecon. Kelkaj el liaj lastaj verkoj, kvaukam ankoraŭ tre belaj, kiel ĉio de la genia artisto, montras klarvideblajn post-
signojn de malfortiĝo: el lia tiama propramana portreto oni ekvidas, kiom la maljuneco lin ŝanĝis.

Oni taksas 2000 la ĉiuspecajn verkojn, kiuj estas konataj de la senlaciĝa majstro. Ili estas disvastigitaj super la tuta mondo; la fama esploranto Humboldt eĉ trovis pentraĵojn de Rubens en la preĝejoj de Perulando.

Petro-Paŭlo Rubens mortis en Antverpeno, la 30^{an} de Majo 1640. En 1840 la Antverpena urbestro starigis al li bronzan statuon.

« Kiam ni demandas al ni, rimarkas Max Rooses, kian rangon okupas Rubens en la historio de la Flandra skolo, tiam ni trovas, ke tiu rango estas altege rimarkinda. La antikva skolo, ĝis Matsijs, pentris la animon sen korpomovado, Rubens kunigis ilin ambaŭ, en mova korpo li kreis senteman animon.

La antikva skolo serĉis lumon, Rubens unuigis koloron kun lumo; lia lumo estas plena je vivo, je ludo, je diverseco. La antikva skolo serĉis veron, la sekvanta celis belecon, Rubens sukcesis kunigi belecon kaj veron. La antikva skolo precipe celis la apartan homon kiel portreto, la sekvanta skolo fandis siajn personojn en sama modelilo, Rubens donis al siaj herooj superan vivon, ne deprenante de ili ilian karakterizan belecon; liaj homoj estas nek pentristaj akademias verkoj nek korpigantaj ideoj; ili estas figuraĵoj el la vera vivo, posedantaj la belecon de l' movado kaj de l' fortikeco. Tiel li redonis al la Flandra arto, kiu fariĝis malfidela al si mem, ĝian veran naturon; denove reĝis ĉe ĝi la koloro, denove la artisto fariĝis vera pentristo, kaj denove la tero estis rigardita de vizaĝo al vizaĝo. Rubens estas la plej alta esprimo de la Antverpena skolo kiu metas super ĉion elegantecon kaj varmon de koloro kaj helecon de lumo. »

VAN DER BIEST-ANDELHOF
el Antverpeno (Belglando).



PORTRETO DE L' PENTRISTO, DE LI MEM

(1) Post la morto de Elisabeth Brand, Rubens reedziĝis je Heleno Fourment.

(2) Max Rooses, konservanto de l' Muzeo Plantin, fama Antverpena scienculo kaj publikigisto, estas la aŭtoro de multaj artikoloj kaj libroj pri literaturo kaj arto. Lia ĉefverko, skribita en Flandra lingvo, estas la Historio de la Antverpena pentristaro.



ORGANIZADO DE ESPERANTA EKSPOZICIO.

La Franca sekcio kaj la Biblioteko.

Kopirajo.

La Alĝera ekspozicio.

Ofte oni petis de ni sciigojn pri la Alĝera esperanta ekspozicio, kies rimarkinda organizado kronis la fruktoportan esperantistan agadon, en Alĝerio, de nia ĉefredaktoro. Novaj petoj, aparte de niaj amikoj de Vilna, decidigis nin ne plu prokrasti la deziritan priskribon.

La alĝera esperanta ekspozicio okazis en vasta ĉambrego de la komerca ĉambro (konsulara palaco). Ĝi daŭris de la 15^a ĝis la 26^a Aprilo 1905, kaj estis organizata laŭ plano longe pripensita kaj tute elpensita de kapitano Capé.

Li volis ke la ekspozicio estu ne sole interesa kaj ampleksa elmontro de esperantaj dokumentoj, sed ankaŭ ke ĝi estu instruo pri Esperanto, per ilia logika kaj sistema aranĝo.

En unua cirkulero sendita al societoj, grupoj, gazetaro kaj ĉefaj propagandistoj estis klarigitaj la principoj sekvotaj, kaj cititaj la dokumentoj dezirataj:

1^o Por ĉiu grupo estis difinita verda kartono sur kiu estus lokataj: geografia skizo montranta la agadejon de la grupo; notico pri la rezultatoj akiritaj de la grupo (en nacia, franca kaj esperanta lingvoj); vidaĵoj de la grupa turbo, kun lokaj kostumoj, fotografiaĵoj de l' komitatoj aŭ de grupanaro, k. t. p.

2^o Specialaj sekcioj estis organizotaj, kiel oni vidus ĉi sube. Detalajn sciigojn oni donis pri la enhavo de tiuj sekcioj.

La alvoko estis aŭdata kaj multaj dokumentoj aldoniĝis al la sennombraj jam persone kolektitaj de l'organizanto, kaj ofte elmontrita de li en liaj paroladoj.

La ĝenerala plano elektita por la dispono de la dokumentoj estis la jena.

Montri kio estas Esperanto.—Impresi tuj la vizitantaron per grandaj kurboj (grafikoj) montrantaj okule la progresojn de nia ideo.—Al kio estas ŝuldataj tiuj progresoj: la propagando kaj ĝia aktiveco en ĉiuj landoj.—Alia maniero elmontri la progresojn de Esperanto kaj ĝian disvastigon: Situacio de Esperanto ekster kaj en Francujo, videbligata de la supraparolitaj kartonoj.—Specialaj uzadoj de Esperanto.—Biblioteko.

Ni nun detale vizitu la ekspozicion, atentante je la surskriboj, kiuj sciigas la vicon laŭ kiu estis necese ĝin fari.

Je la enirejo, maldekstre, granda tabelo enhavanta ekvidon pri Esperanto, (celo, resumo de la gramatiko kun portretoj de D^o Zamenhof kaj de Lev. Tolstoj; ĉefaj favoraj opinioj por la lingvo)—Apude, komparo inter Esperanto, Bollaek kaj Volapük, per apudmeto de « Patro nia » en la tri lingvoj.

Serio de grandaj grafikoj: 1^o Progresado de Esperanto en la mondo, montranta la fondon de ĉiuj grupoj (10 grupoj nur de 1887 ĝis 1900; 193 de 1900 ĝis Marto 1905; deko fondita de la fino de la kurbo (1))—2^o Esperanto en Francujo.—3^o La tutmonda esperantista movado: duobla grafiko de la landoj laŭvice trafitaĵoj de la fondo de grupoj, kaj de la nasko de l' revuoj de la 1889^a jaro.

Poste, la propagando kaj ĝia aktiveco en ĉiuj landoj: Propagandaj poŝtkartoj, kovertoj, leterpapero, surgluaĵoj...; Propagandaj broŝuroj larĝe elmontrita sur kartonoj, (Anglujo, Francujo, Bohemujo, Germanujo, Hispanujo).

Eltraŭnaĵoj de gazetoj, precipe de Germanujo (pruntitaj de S^o Borel, ĉiam servema kaj helpema por ĉiuj propagandaj agoj) kaj de Anglujo (pruntitaj de S^o Bolingbroke Mudie). Kvar kartonoj dediĉitaj al la Kalesa kongreso kaj grandaj fotografiaĵoj senditaj de S^o Lévy, el Valenciennes, plenis tiun rubrikon.

Ĉar la ekspozicio havis lokon en la komerca palaco, granda spaco estis rezervita al la komerca fako; multaj esperantaj komercaĵoj, vidaĵoj de la fabrikejoj, kun klarigaj noticoj, estis videblaj en vitramebloj dum, supre, sur duobla vico de kartonoj, estis elmontritaĵoj cirkulerojn, tarifojn, katalogojn en Esperanto. Ankaŭ leteroj favoraj de kelkaj eminentaj komercistoj kaj inĝenieroj, inter kiuj S^o Funouze estinta Prezo de la Pariza komerca ĉambro kaj S^o Noblemaire, la fama direktoro de la fervoja kompanio P. L. M. ĉiu lasta, en sia letero, promesis favore subteni peton de K^o Capé, celantan enmeton de notico pri Alĝerio kaj la Alĝera grupo, Esperante, en la gvidalbumon de la kompanio P. L. M, kiu estas en la vagonoj je

(1) Por pluaj detaloj, vidu nian *Ian non* (Paĝo 3^a).

la dispono de la vojaĝantoj, kaj kiu estas legata, ĉiujare, de miloj da personoj. Apud la letero estis la notico presita, poste, en la diritan albumon. En apudaj vitramebloj troviĝis: *Esperanto en la oficiala al eria eminentularo*: aŭtografaj (memskribaĵoj) de deputitoj, senatanoj, altaj personajoj varbitaj al Esperanto; *La Ministroj kaj Esperanto*: oficialaj leteroj de la franca militistara ministro sciiganta ke, laŭ peto de kapitano Capé, li permesas al oficiroj kaj al soldatoj aliĝi al francaj esperantistaj grupoj; permeso simila de l' maristara ministro; *En Ĥino, 1900*: leteroj de oficiroj skribintaj ke Esperanto estus multe utilinta por ili en iliaj interrilatoj militaj kun alinaciaj oficiroj; *milita rusa japana*: multaj leteroj de rusaj oficiroj pri tiu temo; *Por la kolektistoj*: etnografia sekcio kaj amaso de leteroj el ĉiuj landoj kun kovertoj montrantaj plej variajn poŝtmarkojn.

Estis poste videblaj pli ol cent kartonoj (65 cent. X 50 cent) dediĉitaj al la grupoj ĉiulandaj. La vido de tiuj dokumentoj, formantaj seninterrompan muregon inter la kolonoj de l' vasta ĉambrego estis ja impresa; kaj la impresado duobliĝis per ega intereso, kiam oni detale rigardadis la surhavon de la kartonoj. Efektive ĉiuj dokumentoj estis akompanataj de kartuŝoj kun detalaj klarigoj pri ilia atentindeco.

Post tiuj kartonoj troviĝis aliaj dediĉitaj al *Turismo* kun eldonaĵoj de l' franca « Turing Klubo » al kiu Esperanto tiom ŝuldas; multaj ilustritaj dokumentoj pri la Rusa-Japana milito; militistaro kaj maristaro; la esperanta elmontraro en la Ekspozicio ĉe St Louis (U. S. A) organizita de la Pariza grupo; dokumentoj de la ekspozicioj de St Omer kaj de St Etienne (De tiu lasta, diplomo ricevita de la tiea esperantista grupo). Fine, ĉar tiu vizito kondukis nin ĝis la elirejo, la sama kiel la enirejo, kaj simetrie je la granda maldekstra tabelo, alia simila enhavanta detalojn pri la Alĝera kaj Nord-Afrika grupo.

En granda vitrameblo, simetria je la komerca estis la biblioteko esperanta: ĉiulingvaj propagandaj broŝuroj; — lernolibroj por ĉiuj landoj; — specimenoj de la esperanta verkaro. Venis poste sciencaj dokumentoj: libroj, revuoj, portretoj de scienculoj favoraj por Esperanto; apartaj fakoj por turismo, Esperanto kaj blinduloj — kun specimenoj de la eldonaĵoj por tiuj malfeliĉuloj (1) — la virinoj, la infanoj kaj Esperanto, kun portretoj de kelke da niaj plej famaj kurbatalantinoj, verkoj kaj revuo por infanoj (2).

Fine tre interesa estis la fako: *la literaturistoj kaj Esperanto* kun verkoj aparte konvinkontaj pri estimo aŭ simpatio akirita de Esperanto inter francaj eminentaj literaturistoj (oni ne forgesu ke la ekspozicio havis lokon en franca lando). Mi citas aparte, de So Montrosier, « Unua Ĉapitro de miaj memorskribaĵoj » laŭ akademiano Fr. Coppée, kies antaŭparolo favora por Esperanto multe impresis la vizitantojn, kaj leterojn ricevitajn de nia lerta kunlaborantino, F^{ino} Flourens, kiu gajnis al nia afero la akademianojn J. Claretie, H. Lavedan, kaj aliajn famajn literaturistojn. E. d'Hervilly, S^{ino} Daniel Lesueur, kies romanon ni komencas, k. t. p.

Mi ne devas forgesi 4 grandajn geografiajn kartojn: 3 montrantaj Eŭropon, Francujon kaj Alĝerion esperantistajn (per la grupoj signitaj per verdaj kartonaj steletoj), kaj la lastan vidigantan sammaniere la grupojn kaj landojn tutmondajn reprezentitajn en la ekspozicio.

Sur grandaj tabloj, revuoj esperantistaj, kaj ne esperantistaj enhavantaj artikolojn por Esperanto; francaj, algeriaj kaj fremdaj ĵurnaloj favoraj ankaŭ; multaj eldonaĵoj ĉiulandaj disdonataj.

Tia ekspozicio, kompreneble, postulis senintermankan kaj zorgan preparadon. Ni estas certa esti tre agrabla al la direktinto de l' tuta laboro citante la nomojn de S^{oj} Neukirch, Cousin, Bresson, Lapesqueur, kiuj ne timis ofte kunveni ĉe lin por partopreni en la arango de la dokumentoj, laboro kiu daŭris pli ol 4 monatoj. Tre fervore ankaŭ laboradis, hejme, S^{oj} Foussat kiu elmontris, inter aliaj, tre interesajn dokumentojn pri la Bohema edukado, kaj etnografiajn, kaj kiu ellaboris du el la grandajn grafikoj; kaj S^{oj} Ch. Hérou, kiu faris la aliajn.

Iia penado ne estis perdita: ĉirkaŭe 10.000 personoj vizitis la ekspozicion, inter kiuj multenombraj eminentuloj de Alĝero; de l' tutmondo ankaŭ, ĉar, dank' al antaŭvido kaj persisteco de l' organizinto, la ekspozicio havis lokon en la ĉambrego kie, precize, okazis la malferma kunsido de l' internacia kongreso de l' Orientajstoj kaj la ferman de tiu kongreso kaj de tiu de l' sciencaj societoj. Tiun lastan kunsidon prezidis la

ministro de l' publika instruado; kaj kien ajn li direktis la okulojn, ĉiam li vidis ian esperantaĵon kaj diversajn grandajn propagandajn afiŝojn, proklamantajn grandegalitere la meritojn kaj indon de Esperanto.

STELETO.

La Esperantista « Ŝlosilisto ».

So Ĉefeĉ estas ja bonega ŝlosilisto. Liaj lertaj manoj naskas verajn admirindaĵetojn. Post la sveda estas ĵus aperinta la hispana ŝlosilo. Ofte ni parolis pri tiuj libretoj, kiujn ĉiu Esperantisto devus posedi kvante, ĉar ili taŭgas por ĉiuspecaj propagandoj.

Aparte So Ĉefeĉ pretendas ke la Ŝlosiloj estas oportune uzeblaj por formado de grupoj kaj por varbado de novaj grupanoj:

« Oni proponu premiojn por la plej bona deĉifraĵo de ia artikoleto enigita en la lokan ĵurnalon kaj metu al la dispono de la legantoj --- senpage aŭ por afrankita koverto kun adreso --- la ŝlosilojn, klarigante ke ili enhavas plenan gramatikon kaj vortaron kaj ke nenio plu bezonas por legi Esperanton. »

E. ĈEFEĈ.

Kelkaj personoj neis tiun taŭgecon. So Ĉefeĉ volis pruvi perfekte sian diron. Li faris interesan kaj tre sukcesiitan provon, pri kiu li afable skribis al ni.

« Oni diris al mi ke mia propono uzi la ŝlosilojn por la formado de grupoj ne estas praktikebla.

Mi do decidis fari mem praktikan provon.

Kun la helpo de So James Blaikie M. A. (li mem ŝlosile varbito) mi sukcesis interesi la eldoniston de la « Norwood Press » por mia plano. »

La « Norwood Press » estas ĵurnalo disdonata senpage en la ĉirkaŭaĵo de West Norwood, kaj tial la legataro estas limigita al la loĝantoj de tiu ĉi ne granda antaŭurbo.

La 3^{an} de Febr. la Norwood Press oferis premion de 1 Gineo (=26.75 frankoj) por la plej bona deĉifrado de la sekvanta artikoleto en Esperanto:

EN LA TEATRO. — Dum la prezentado de ia teatra ludo diris sinjoro al sia najbaro: —

« Kiel malbela estas tiu ludantino! »

« Tiu estas mia edzino, » li respondis.

« Vi malkomprenis, Sinjoro! Mi ne aludis al tiu sinjorino kun la nobla kaj gracia sintenado, sed mi celas la junan ostan malbelulinon kun la akra nazo. »

« Estas mia filino Sinjoro. »

La ĉefa kondiĉo estis ke la divenontoj ne jam konis Esperanton, kaj ke ili tradukante, nur uzu la ŝlosilon.

La « Brita Esperantista Asocio » akceptis la oficon decidi la gajninton.

96 personoj konkursis kaj sendis divenaĵojn. El ili nur 4 faris gravajn gramatikajn erarojn.

La aliaj 92 sendis ĉiuj mirinde bonajn deĉifraĵojn kaj la ekzamenisto en sia raporto diris:

« Mi ĝojas diri, ke tiu ĉi konkurso denove kaj decide pruvis la facilecon de Esperanto kaj samtempe ankaŭ la utilecon de la malgranda duonpenca ŝlosilo. »

La pli multo de la partoprenintoj en la konkurso apartenas al la plibela sekso, kaj la gajnintino, kiu elektis la pseŭdonimon « malbelulino », oni diris al mi, tute ne estas tia.

La fakto ke 96 personoj provis la deĉifradon, signifas ke, tion farante, ili jam duone fariĝis Esperantistoj kaj certe estis interesitaj por nia lingvo.

En la sekvanta numero de la « Norwood Press », S^{ro} Blaikie anoncis paroladon pri Esperanto en la « Willoughby Hall ».

Ĉeestis pli ol 120 aŭskultantoj elmontrantaj grandan interesiĝon.

Post la fino de la parolado jam 16 personoj subskribis alvokon por la formado de nova grupo, kaj fariĝis aliĝintoj.

Dum la venonta semajno ni sendos inviton al la 96 konkursojntoj en la premiofero, kies adreso al ni donis la eldonisto de la « Norwood Press », kaj mi esperas ke la rezultato de tiu ĉi praktika (provo estos nova Norwood'a grupego.

Nun ankoraŭ mi diras « kio estis pruvota » sed baldaŭ « kio estas pruvita. »

Londono, la 18^{an} Febr. 06.

E. ĈEFEĈ.

(1) Tiuj verkoj, eldonataj per Braille'a sistemo, sub direktado de l' sindona So Cart, kosta tre kare; ĉiuj kiuj interesas al la blinduloj lin helpu sendante sian monoferon, eĉ ofereton; ili partoprenos en verkon ja indan de Esperantistoj: verkon de homa solidareco (Th. Cart, 12 R. Safflot, Paris).

(2) « Juna Esperantisto », ĵus pliampleksiĝis kaj tre takse pliboniĝis. La nova revuo, en ĝia mita formo, partoprenos certe tre utile en la dissemado de Esperanto inter junularo kaj ni tre rekomendas ĝin al gepaĉoj por iliaj infanoj.



Karnavalo de Nice.

De Fraŭlino Y. JOULIN (Francujo).

Karnavalo de Nice estas fama en la tuta mondo. Kiu ĝin ne vidis nenion vidis, kiel diras la proverbo. La sekvanta priskribo, speciale farita por « Tra la Monds », de ĉarma okulvidintino, donas almenaŭ ideon pri tiuj specialaj kaj frenezaj festoj.



EL PROGRAMO DE L' FESTOJ.

Se la alilanduloj venas grandeganombre *Nicon* ĉiun vintron, la kaŭzo ne estas nur la printempa klimato de tiu ĉi urbo, ĝia escepta sido sur la marbordo de la blua Mezamaro (*Mediterraneo*), ĝia zono el altaj montoj kronitaj de neĝo, ĝiaj floroj, kaj ĝiaj riĉaj domoj; — sed ili venas ankaŭ por ĝui la tutajn belajn festojn donatajn tie, inter kiuj Karnavalo estas la reĝo de la plezuroj.

La karnavalo de *Nice* estas fama; ĝia famo altiras milojn da videmuloj, kaj ĝia gloro estas bone meritita, tial ke ĝi estas ununura kaj vere mirinda apud ĉion, kion oni povas vidi ĉie aliloke. Tie ĉi la reĝeco de karnavalo ne estas unutaga; la ĝojajoj intersekviĝas dum dek du tagoj, kaj malgraŭ tio, la gajeco konstante daŭras. La Nica popolo havas specialan karakteron: ĝi dediĉas tute ĝian personecon al sia Karnavalo; dum tiuj dek du tagoj, ĝi ne ĉesas ridegi, danci, kanti. Vestante la tradician « domonon », la popolo forgesas ĉiujn siajn zorgojn, ĉiujn siajn mizerojn. Karnavalo estas la ĝojo kaj la delira frenezeco; poste,

oni rekomencos la seriozajn aferojn, la gravajn laborojn. La Nicianoj ne ĝojas solaj, ĉiuj fremduloj traŭrantaj *Nicon*, vestiĝas per domenoj, per multkoloraj kostumoj; ili metas grimacajn maskojn kaj permesas al si ĉiujn fantaziaĵojn.

Jen estas la unua tago de Karnavalo. La bombardilo tondras je la honoro de ĝia karnavala Moŝto, kiu faras triumfeĝan alvenon en sian urbon afablan. Tiu Moŝto konsistas, tiun ĉi jaron, el grandega Reĝo de Suno, rajdanta sur vastega aglo. Ĉio ĉi superas la altecon de dua etaĝo; kaj oni estas konstruinta, sur la precipa centra placo de la urbo, grandegan kajuton por loĝi Reĝon-Sunon, dum la tuta daŭro de Karnavalo.

Ja, ĝia Moŝto faras sian eniron, vespere, sub mireginda kvanto da iluminadoj elektraj: oni ne povas vidi ion pli feinimpresan ol tio. Kaj la Reĝo havas sekvantaron indan je ĝia majesteco. Unue, Sinjorino Karnavalo, tiel grandega kiel ĝia edzo; poste, multaj ĉaroj, multaj grupoj da maskoj, kavalkadoj, muzikistoj, fajropumpistoj, ĝendarmoj: la tuto inter du rangoj de soldatoj, kaj sub ĉielo brila per multegaj steloj. La vetero estas admireginda, la popolamaso estas grandega, la festvespero finiĝas en blindigaĵo de lumoj.

Du tagojn poste, la tuta sekvantarego rekomencas la marŝadon, sub la lumsuno tiun ĉi fojon. Novaj ĉaroj kaj novaj multegaj maskoj estas venintaj kuniĝi al ĝia karnavala Moŝto; ĉio ĉi estas treege diversa, tie estas aludaĵoj, nuntempaĵoj, alegorioj, vortludoj, karikaturoj, kaj tiel plu. Jen estas grandega ĉaro prezentanta la mallumiĝon de Suno okazintan la lastan jaron. Alia ĉaro personiĝas kometon eltrovitan antaŭ ne longe de la observatorio meteorologia de *Nice*. Alia prenas la nomon de la nova danco: la *Matichiche*. Oni vidas grupojn de Ĥinjoj, fantaziajn muzikojn de



ĜIA KARNAVALA MOŜTO.



ĈARO DE LA MALLUMIĜO DE SUNO



GRUPO DE MASKOJ.

katoj, strangajn seriojn de bestoj, de floroj, de legomoj, kaj tiel plu. — Oni ne povas bone imagi la gravecon de tiu sekvantaro, kaj la alfluon de la popolo tute maskita kaj tute batalanta per «*confetti*» (konfetti). Vespere, oni ankoraŭ iluminas mirindege kaj oni rekomencas, sur la stratoj, puŝegon, *confetti*-batalon kaj deliran ĝojon.

Alian tagon, okazas flora mara batalo en la rodo de *Villefranche*, kaj la franca eskadro, veninta por tiu cirkonstanco, ornamas multajn beletajn barkojn per multkoloraj floroj kaj ĉarmaj sinjorinoj.

Pli malfrue, okazas florbatalo inter veturiloj riĉe ornamitaj; vespere, granda maska balo. Alia *confetti*-batalo kaj admireginda balo en la Opero, kie la tutaj dancantoj devas esti riĉe kostumitaj nur ruĝe kaj blue. Alia florbatalo, kaj fine, la lastan tagon de tiuj du frenezaj semajnoj, okazas tre kurioza batalo per Nicaĵaj *confetti*: ili estas malgrandaj globoj en gipso, ke oni forĵetas fortege per metalŝovelilo; tiu ludo estas iom danĝera, sed por ĝui de la tuta Karnavalo oni metas antaŭ sian vizaĝon maskon en retaĵo (metala tolo), kontraŭ la polvo

de gipso; tiuj lastaj detaloj estas vere lokaj, kuriozaj kaj strangaj. La lastan vesperon, belega iluminata fajrado kaj festfajro per ĝia karnavala Moŝto. Ĝia korpo foriras en multaj raketoj, ĝia animo forflugas en fumo: Karnavalo estas malviva. La tutaj festoj estas finitaj, kaj meze la lasta puŝego, oni kantas kaj pensas al Karnavalo ĝis la venonta jaro.


Se la serio de tiuj festoj restas neforgesebla, la kaŭzo ne estas nur la brilo de la iluminadoj, la riĉeco de la kostumoj, la amplekso de la ĉaroj, la kvanto da

maskoj; la kialo estas ankaŭ la nekaŝema gajeco, la sana frenezeco, la strangeco de la amuziĝoj; kaj precipe la admirinda suno, kiu alportas sian sufiĉegan lumon kaj sian malavaran varmecon, dum la neĝo falas kaj falas densege en aliaj landoj, egaligante ĉion per ĝia blankeco, entombigante la melankoliajn tagojn.

Vivu *Nice* kaj ĝia Suno!
Vivu Karnavalo kaj ĝia gajeco!!

Originale verkita kaj ilustrita de
FINO YV. JOULIN el Orléans
(Francujo).





ELSPUTO DE VEZUVIO
Eljeto de ŝtonegoj.

La Elsputoj de Vezuvio !

De Grafo A. GALLOIS (Italujo).

« Kiu Napolon ne vidis, nenion vidis, » diras la proverbo. — Plie mi diros : « Kiu neniam vidis Vezuvian elsputon, nenion vidis ! »

Kia spektaklo, efektive, estas pli belega, pli terura kaj samtempe pli admirinda ol la vidaĵo de tiu fama vulkano, kiam, nokte, ĝi projektas grandegajn kaj senĉesajn garbojn el helaj lafoj, kiuj ventumilforme altiĝas en la malhela ĉielo, kaj kaskade refalas, simile al belegaj fajreroj de grandega fajrado ! Dum la mallongaj momentoj de ĉiu elsputo, la tuta vulkano estas iluminata per brilanta lumo ; facile oni vidas ĉiujn vilaĝojn, kiuj kuŝas sur la flankoj de l' monto, ĉirkaŭ la piedo de la vulkano.

Ĉiuj elsputoj ne estas similaj : kelkafoje, la lafa garbo rekte altiĝas, kiel longa kaj brila fajra sago ; poste, ĝi refalas por rapide deflui per mallarĝa sed terura rivero, kiu ĉion detruas. — Kelkafoje, nur grandega eljeto el bolantakvo suprensaltas, kaj simile al granda akvofalo ĉiuparte reŝprucas kvazaŭ brulanta pluvo. — Tiunĉi fojon, malhelaj pecoj de ŝtonegoj eliras el la kratero, kun timiga bruo, kiu kreas teruron ĉe la ĉirkaŭaĵo ! — Ofte, la tero malfermiĝas, produktante grandegajn fendojn, el kiuj fajfas sulfurodoraĵoj vaporoj ; tiam, iom post iom, la fendoj plilarĝiĝas, kaj baldaŭ novaj krateretoj formiĝas, kaj projektas novajn garbojn



DUM LA FEBRUARO ELSPUTO.

el lafoj, el bolantakvo, kaj el brulantaj ŝtonegoj, kiuj alportas ruinon kaj morton ĉe aliajn vilaĝojn !

Tamen, ĉiam la spektaklo de Vezuvia elsputo forte impresas kaj havigas neforgeseblan senton por la belega kaj terura vidaĵo, kiun montras la timiga vulkano, kiam ĝin oni vidas, kun ĝia malhela plumfasko el nigra fumo, kaj la ruĝaj lumetoj de la oscedanta forno de ĝiaj krateroj, la teruraj eksplodbruoj de ĝiaj elsputoj !

Aliparte, multaj turistoj ĉiutage venas viziti la faman, sed timindan vulkanon, kaj admiri la spektaklon de unu el ĝiaj elsputoj.

Pro tio, la monda firmo « Cook » konstruigis fervojon, kiu alkondukas la vizitantojn ĝis la piedo de l' monto ; poste, suprenirigilo, nomita « runikolaro », supreniras, kaj veturigas ilin sur la flankoj de l' vulkano, kaj fine ili alvenas, piede, al pinto, sur la rando de la kratero. Sed, ĉe tiu ĉi loko, la danĝero

estas tre granda, eĉ kiam la vulkano estas trankvila. Mi kredas memori ke, unufoje, angla turisto falis en la senfundan truon, malaperis en la profundaĵoj de l' tero, kie, kompreneble ĉiam li restis. Se tiu ĉi fakto ne estas vera, almenaŭ ĝi estas tute verŝajna kaj tute ebla.

Originale verkita de
Grafo ALBERT GALLOIS,
El Riolunato (Italujo).



DIVERSAJĴOJ



La Vivado de Teoplantisto en Hindujo.

Verkita de Li mem (Sekvo).



Kopirajto.

JOBINI, TIPO DE BENGALINO.

rizo. La bambuoj, kiuj arbarete ŝirmas ĉiun vilaĝon en Asam'o, provizas ĉiujn iliajn postulaĵojn por fari ŝarĝoveturilojn, teksilojn, matojn, kaj eĉ tiajn artikolojn, kiel pafarkoj, sagoj, ligiloj, korboj, fiŝkaptiloj, k. t. p.

La Asam-viroj sarkas la teron inter la teŭjoj. Eceptante lumbdrapon, iliaj pot-koloraj korpoj estas nudaj: ilia longa hararo estas poste bindita, simile kiel la virinoj. Se la tago estas tre pluva aŭ la sunaj radioj tre varmegaj, ili portadas ĉe la laborado larĝan ĉapelon faritan el grandaj folioj. « Vere, filoj de la Naturo » — vi diras? Jes; sed multe da ili aperas kiel Sovaguloj de la Arbaro!

La Asam-virinoj deprenadas la tefolietojn kun la Bengalinoj. Ili sin vestas per kelkaj metroj da tuko memfabrikita. Ili havas mallongajn korpojn kun dikaj membroj; iliaj vizaĝoj estas malbelaj kaj ilia vestaĵo malpura: alivorte, ilia vidiĝo estas tute malplaĉa. Ilia movado, kiel ilia intelekto, estas tre malrapida.

Ce la Eŭropano ili fariĝas kiel infanoj; senkura-

La Asamanoj precipe estas primitiva popolo.

Se malsanaj, ili rifuzas la kuracilon: anstataŭ tio, la kunloĝantoj alvokas iliajn diaĵojn per ofero, kolomboj, ovoj, kaj verdaĵoj, kune kun brulantaj meĉaĵoj. Tia farado nomiĝas (1) « *Fuĵa* ». Komprenoble, la malsanulo plej ofte mortas.

Iliaj budoj, kiuj vilaĝete staras ĉe la ĝardena randaĵo, tute konstruiĝas el longa herbajo kaj kanoj sur bambustrabajo. La plej malgranda fajrero estas, tiale, pereiga. Krom la fruktoj, kiuj multnombre kreskas inter iliaj loĝejoj, ilia sola manĝaĵo estas

ĝaj, senspiritaj, kaj timemaj. Okaze, mi prenis mian man-fotografilon en la teejon por fotografi la Asamanojn. Mi alproksimiĝas al juna virino kies infano envindita portiĝas ĉe ŝia dorso: sed ŝi ekforiras kiam mi klopodas por trovi la fokusaĵon; kaj kvankam mi penis parole klarigi al ili mian intencon, mi ne povis iun fotografi. Poste, mi montris al ili, — kiel komprenigilo, — helan fotografiaĵon de Bengala virino, de mi faritan: sed ho ve! ĝi ŝajnis al ili nur peceto de papero! Ili tute ne rimarkis la ilustraĵon!! En tiaj cirkonstancoj, kion fari?

La Bengalanoj tute diferencas. Bone vestitaj kaj tre inteligentaj, kun ili paroli estas plezuro. La viroj portas jaketon kaj turbanon, krom la lumbdrapon. Ili klopadas pri la maŝinoj en la te-fabrikejo. La virinoj portas robojn diverskolorajn; kaj kvankam ili havas malpalan haŭton, tamen la polura hararo, la okuloj, la brilantaj dentoj, kaj la belformaj membroj, kombinite, prezentas rigardindan pentraĵon, en kadro de suniluminata teverdaĵo.

En la ĝardeno ili kantas dum la folikolektado. Ĉe la administranto ili silentiĝas, sed ĉe mi ili ĉiam estas kontentaj — eĉ ŝercemaj. Sed la laboro estas gravega; kaj tial ke mi estas nur unu, kaj ke la kunlaboristoj estas multcentoj (foje 600 kuniĝas), mi ofte devas koleri, eĉ tre koleri.

(Daŭranta).

Originale verkita kaj ilustrita de ALFRED T. SIMPER.



Kopirajto.

LOĜEJOJ DE LA RULIARO.

(1) Puĵa = Hinda vorto por publika esprimado de la religisento, ĉu oferaĵa, ĉu dancada.

FELIETONO

La Torento el Saŭmo

Originalo de DANIEL LESUEUR (Francujo).

Ama kaj nokta promenado tra itala pejzaĝo.

La lago de Côme (Komo) dormas en l'ombro. Vere dia paco altflugas super la pejzaĝo, kies beleco ne povas esti vualata de l' plej profunda nokto. Tiu ĉi septembra vespero, kvankam sen luno, envolvas la objektojn per senlumeco duone diafana tiel dolĉa kiella bonega atmosfero tute varmeta kaj parfumita. Eble iom tro mola. Tie, apud la pintoj elegantaj starantaj je l'okcidento, al Lugano, amasiĝas vaporoj. Fulmotondro rapide alvenas al la lago de Côme. Ventbato sufiĉas por forigi de l' grandaj Alpoj la nubojn ŝvelitajn felsake, kaj ilia furioza kurado tra la varma aero de Pitalaj valeoj eksplozivas l'elektron kaj kraketigas la hajlon.

La viro, kiu laŭiris la dezertan vojon, iom super la bordo, tute ne rimarkis la minacojn de l' fulmotondro. Ankaŭ la nokta ĉarmo ne tuŝis lin, aŭ nur per la dolĉe voluptema incito, kiun ĝi lerte enigis en lian koron, kaj kiu tiel harmonie konformiĝis kun liaj sentoj. Jako Ferneuil estis ama. Sed ne unu el tiuj estajoj privilegiitaj de l' sorto, kiuj duope iras ĝuadi l' ebricon de l' revo en tiun landon, kie l' amo ŝajnas la spiradon mem de l' eternaj verdaĵoj, de l' floroj kaj de l' akvoj. Li amis, kaj en tiu bonega vespero, li marŝadis sola. Li amis, kaj li nesciis, ĉu li estas amata. Li amis, kaj li ne kuraĝis deziri, ke la pura kreitaĵo de kiu li ne povis deturni sian pensadon partoprenu en lia pasio — ĉar ŝajnis al li, ke eĉ la deziro estus krima kaj tro timinda kontraŭ ŝi.

Li iris, de Varenna al Fiumelatte, eble la plej modesta el tiuj pentrindaj vilaĝoj etendiĝantaj ĉie, kie la monto lasas iom da spaco inter sia kruta muro kaj la lago. Fiumelatte estas karakteriza nomo. Ĝi estas la plimalgrandigo de « fiume di latte » (lakta rivero). Intermita kaskado alta je tri cent metroj, impresiga belege, pravigas tiun ĉi nomon. De malproksime — ekzemple, de l' ĝardenoj de la kampodomo Serbelloni, super Bellagio — oni volonte kredus, ke oni vidas disflui laktan torenton sur la malhela fondo de l' verdanta krutaĵo.

Por utiligi la movan forton, tie grupiĝis kelkaj domoj preskaŭ ĉiuj havantaj grandan radon kun trogoj. Sed nur intertempe ili aktiviĝas.

La lakta rivero, defluo de interna lago, ŝprucas nur post pluvegado. Ĝi obeas la leĝojn de l' sifonoj. Kiam la pluvego estas altiginta la nivelon ĝis ia fendeto, la tuta akvujo malpleniĝas. Por tio, du aŭ tri tagoj estas necesaj, eĉ post cesiĝo de l' pluvo. Poste, la kavajo pleniĝas per enpenetriĝoj, ĝis kiam fulmotondro denove elfluigante ĝin, perforte elĵetas ĝian enhavon. La furiozeco de l' falo kaj la malglataĵoj de l' ŝtonego pulvorigas l' akvon en tia grado, ke de ĝia elirejo el la monto ĝis la lago de Côme, kiu englutas ĝin, la torento estas nur ŝaŭma bolado. De tio venas ĝia blankeco kaj ĝia nomo.

Ne por revidi tiun admirindan naturan kuriozaĵon, Jako de Ferneuil laŭiris la vojon, preskaŭ malluman ĉe tiu loko pro longega rango da abioj superantaj la muron de bieno. Se lia intenco estus tia, li irus returnen; ĉar la profunda silento etendiĝanta super la vilaĝo al kiu li proksimiĝis estus jam sciiginta lin, ke la Lakta Rivero troviĝas seka.

Ĝia ŝtona kuŝujo, preskaŭ vertikala, ne konservis unu guton da akvo. Restis nenia eho de ĝia furioza kriegado. Mutaj estis la grincaj radoj, kiujn ĝia movego turnigas.

La kapricoj de l' torento tute ne malkvietigis Jakon kaj tamen, kio puŝis lin rekte antaŭen, tio estis malkvietigita kaj terura forto, kiel la forto, kiu, ĉe iaj momentoj, malvolvas sur la ĝemanta monto la timigitan forkuron de l' akvoj.

Sekrete reveninta de Côme, malgraŭ ĉiuj ĵuroj faritaj en si mem, ke li ne revidos la belan Veronikon, li estis atendinta la nokton por iri ĉirkaŭvagi ŝian loĝejon. Kion li esperis? Ĉu li unuafoje ne estis forlasinta la landon, kiam li eksciigis, ke ŝi estas orfa, saĝa, kaj ke li ludus abomenindan rolon provante delogi infaninon, je kiu li ne intencis edziĝi. Ĉiam ekzistis ĉiuj kaŭzoj decidigintaj lin subite foriri. Kial li retroviĝis sur tiu vojo, kaj marŝanta al tiu direkto. Ha! Kial?... Se ne, tial ke la pasio estas, inter la fortoj de l' naturo, unu el plej nehalteblaj kaj nevenkeblaj.

Jako Ferneuil, artisto pariza, ne havis tamen trograndigitajn konsciencdubojn pri la amaj aventuroj. Ĉar lia ĉirkaŭularo, lia edukiteco malmulte inklinigis lin al la severmorjoj. Tamen lia plena honesteco ribelis. Ĉiu paŝo antaŭen kaŭzis al li riproĉon de konscienco. En lia sento estis io profunda enhavanta respekton, kiu mirigis lin kiel grava simptomo.

Kiam, tri semajnoj antaŭe, li ekloĝiĝis ĉe la Reĝa Hotelo en Varenna, la junulo havis en sia kapo nenian romaneman ideon. Li intencis labori, ekpreni, skizi tipojn por sia pentraĵo rezervota por la proksima salono. Dum siaj observemaj vagoj tra la pejzaĝoj kaj inter la homoj, li estis rimarkinta Veronikon. Malriĉa laboristineto de silko el Fiumelatte, sed tiel kortuŝante bela, ke subite li estis furioze agitata. Unue ŝi aperis antaŭ li sur strateto de l' vilaĝo, unu el tiuj pentrindaj stratetoj suprenirantaj la monton, kaj kien li estis metinta sian stablon por fari skizon. Sendube ŝi ĵus ĉerpis el la kaskado iom da malvarmeta akvo por si kaj siaj laborejaj kunulinoj. Li vidis ŝin enirantan, kun ŝia kupra kruĉo sur la ŝultro, tra pordo tute malfermita, kaj antaŭ kiu li baldaŭ staris. L' artisto vidis kvazaŭan garbejon, ŝirmantan tri aŭ kvar stablojn, kiujn virinoj movigis per la piedo, ĵetante la teksobobeton per la mano. Oni aŭdis la laboristinojn kantan-

tajn, kaj ili eĉ ne turnis sian kapon, se fremdaj promenantoj haltis ĉe l' sojlo, ĉarmitaj de iliaj vivaj gestoj kaj klaraj voĉoj, de l' ĉarmo de l' junaj brustoj sub la dika tolo de l' korsaĵoj, kaj de l' riĉeco de l' nigraj hararoj starigitaj kiel brilaj kaskoj.

Romanema aventuro. La Bela Veroniko.

Sed la ceteraj, apud Veroniko, ŝajnis pezajn kamparaninojn. Ŝi estis delikata kiel profilo de frizo Pompei'a, kun la kapo de virgulino de Bellinĵ. En Jako de Ferneuil, estis unue la pentristo, kiu entuziasmiĝis. Li volis fari la portreton de tiu infanino, kiu, li pensis, estas deksep-jara, kaj sur kies fizionomio rebrilis beleaga pureco. Ŝin atendi, sekvi, alparoli estis elementaj manovroj, kiuj, li kredis, ne havus gravajn sekvojn. Tamen, la knabino ŝajnis al li sovaĝa. Ŝi sciis nur rideti kaj skui la kapon. Ŝi eble ne komprenis la sufiĉe bonetan italan lingvon parolatan de l' franca sinjoro, kaj parolis nur sian provincan lingvaĵon. Li tamen rimarkis iajn rugaĵojn sur la delikataj vangoj kaj iajn dolĉe kortuŝajn rigardojn en la longaj veluraj okuloj, pro kiuj li permesis al si kredi, ke liaj blondaj lipharoj kaj lia vigla eksterajo ne estis farintaj tro malbonan impreson sur la knabino. Ian tagon, li akompanis ŝin ĝis ŝia pordo ne rimarkante la timigitajn vizaĝojn de l' genajbaro. Ŝi loĝadis en la lasta domo, super la vilaĝo. Al ĝi oni alvenas suprenirante vojeton finiĝantan post du paŝoj, ĉe l' bordo de la fendo, kie ruliĝas la saŭma torento. Almenaŭ ĝi tie finiĝas rilate la homajn komunikojn. Ĉar oni povas laŭiri ĝin ankoraŭ pli alten ĝis ligna ponto jetita super la profundegaĵon, sur kiun iras la turistoj por impresi sin per la grandbruaj kaj furiozaj akvoj enspirataj de l' malpleno, ricevi la pikantan kareson de l' ŝprucoj, kaj duonesveni per kapturino tra la vento kaj la nebuloj de l' katarakto.

Ferneuil estis kredinta diveni, ke Veroniko loĝadis sola, ĉar neniu atendis ŝin en ŝia kampa domo. Sed, kiam li ekpensis sendi la komisiiston de l' Reĝa Hotelo, por ke li informiĝu, kaj kiam li prenis tiun ĉi viron kiel tradukiston por peti la ravan italinon pri kelkaj momentoj, cetere bone pagotaj, dum kiuj li farus sian portreton, la vero aperis al li, malkontentiga. La juna laboristino troviĝis sub la zorganteo de timinda viro, kiu ne ŝercus, se li sciis ke la virto de l' purulino estas en danĝero. Laŭfame, li estis la plej bruti karaktero en tiu tuta regiono. Tio ne estas malmulte diri. Ĉar la sango estas varma kaj la venĝo rapida, ĉirkaŭ tiuj tro voluptemaj lagoj, inter tiuj tro sovaĝaj montoj, en tiu naturo el kontrastoj, flamigita kiel Sicilo, pli sekreta kaj malhebena ol Korso, kaj kuraĝa kiel ĉiuj limlandoj.

Veroniko estis la fratino de Matteo Nello, l' akcizisto: viro pli maljuna ol ŝi je dek kvin jaroj, havanta malafablan kaj koleregeman karakteron, kaŭzanta malhelpaĵojn al la kontrabandistoj.

Tiuj ĉi lastaj ne estis la solaj havantaj profitan timon al li. En la tuta ĉirkaŭaĵo de l' lago de Côme, oni ne renkontis unu junulon sufiĉe malmegan por amindumi Veronikon, se tio ne estus por la bona kaŭzo. Pro ŝia granda juneco kaj ŝia malriĉeco, tio ne estis ankoraŭ okazinta. Dume, l' akcizisto sovaĝe suspektema pri la honoro de sia fratino, kaj devante forlasi ŝin ofte pro sia metio, zorgis, ke ĉirkaŭe oni scias, kiamaniere li komprenas la familian honestecon. Ĉe la unua ŝajno de kulpo, li kriis, li mortigus

la junulinon kaj ankaŭ ŝian amanton. Neniu dubis pri tio, ke liaj agoj konformiĝus kun liaj paroloj, se oni donus pretekston al li.

L'eksterordinara beleco de Veroniko ne povis superi la timegon inspiritan de ŝia frato. Kutiminta al la singardema sindeteno, kiun montris ĉirkaŭ ŝi la junuloj de ŝia vilaĝo, eble la junulino estis ŝatinta la ĉarmon iom senĝenan de l'alloganta fremdulo. Ĉu ŝi revis pri li, tie supre, en sia dometo altestaranta sur la monto, kaj kiu, tiel ofte, tremis je l' bruego de l'akvoj? Jako tion nesciis. Ian tagon, oni estis antaŭdirinta al li, ke Matteo Nello, eksciinte ke lia fratino sin lasas delogi de Franco, multajn fojojn spionis ilin tenante sian paŭlon preta por pafi, se li vidus la plej negravan ameman geston. Veroniko, ĝojigita de l' penso, ke ŝi vidus sin pentritan, naive petis permeson de sia frato por iri antaŭ l'artiston. Terura kolero rezultis de tio.

Danĝera idilio sub la minaco de la homoj kaj de la elementoj.

La Italo estis opiniinta, ke tia propono estas malbonega. Ĉion oni devis timi je liaj vokitaj suspektoj. Antaŭ situacio tiel ridinda kiel tragedia, Ferneuil estis decidinta foriri por ĉiam. Por Veroniko, li timis Matteo'n. Por si mem, li timis sian propran koron. Ĉar li ekenamiĝis tiom pli, ke la malhelpaĵoj estis multnombraj. Li estis malstariginta sian stablon, skrapinta sian paletron, pleniginta sian vestkeston. De ok tagoj, li loĝadis en Côme. De sep tagoj, la febro de amo bruligis lian cerbon. He! Kiel! li, Jako Ferneuil, suferis kaj malsagiĝis pro itala laboristino!.... Tio estis absurda, nekredebla!.... Multe pli malbona ol tio.... Tio estis malbela.... kaj hontinda. Li konfesis sian kulpon, mokis sin, bataladis. Sed la figuraĵo tute restita en lia memoro, tiu dia vizaĝo kun malpalaj kaj dolĉaj okuloj, l'ovalo perfekta, l' adorinda buŝo, kaj, sur la frunto kaj la nuko tiel puraj, tiu musko iomete orumita de l' haretoj borderantaj la densajn nigrajn harligojn, ĉio ĉi tio tro forte influadis sur liajn fibrojn de viro kaj de artisto.

«Unufoje, nur unufoje, mi ŝin revidos», li diris al si. «Hodiaŭ vespere, mi iros, dum ŝia frato deĵoros. Mi lerte alvenos ĝis ŝia dometo. Ŝi venos paroli kun mi, kiel ŝi jam faris, super la palisaro de l' ĝardeno. Eĉ mi ne eniros. Kaj morgaŭ, mi ekiru Parizon! Tiam mi devos ja forgesi. Ĉar fine, kion dirus miaj gepatroj se, kiel bofilinon, mi kondukus al ili lombardan kamparineton, eĉ se ŝi havus la belecon, la modestecon kaj la naturan distingindecon de tiu adorinda Veroniko.»

Jako Ferneuil rapidigis sian paŝon. Li forlasis la ĉefan vojon, komencis supreniri vojeton. «Tiu maniere, pensis li, mi ne trauros la vilaĝon. Neniu povos raporti ion al tiu bruti akcizisto. Por nenio en la mondo, mi ne volus altiri al tiu kompatinda infanino la venĝon de tia viro. Se li sciis, ke mi estas tie ĉi, li neniam volus kredi, ke lia fratino estas tute senkulpa pri mia ĉeestado, ke ŝi ĝin nescias, ke pro ĝi ŝi eble kolerekos....»

(Daŭranta)

Esperantigita de
JOHANINO FLOURENS (Francujo).

Algeriaj skizoj.

SIDI OKBA.

Sude El Kantara, pri kiu mi parolis en la unua numero de « TRA LA MONDO » kuŝas oazo kaj



Ĉe SIDI-OKBA.
La Vendejo.

araba urbo tre konataj de l' turistoj sub la nomo « Sidi Okba » (1), devenanta de fama mortinta Marabut'o (2).

La urbo estas ja kurioza, kaj por tiu, kiu ne jam vizitis araban urbon, ĝi estas tute interesa. Mi havis ŝancon ĝin viziti dum bazara tago.

La animeco estis neordinara kaj hazardo kondukis miajn paŝojn apud la Moske'on (3) ĵus kiam oni faris la preĝon. Pro la cirkonstancoj la Moske'o estis pleneĝa; eĉ multaj piuloj ne trovinte spacon en ĝi, preĝis en koridoroj kaj kortetoj apudaj.

Car la religio postulas ke oni ĉiam preĝas rigardante Orienten, la ekstere estantoj montris dorson al la preĝejo; kaj tio estis ja kurioza vidi tiujn multajn homojn starantajn kliniĝi, genufleksi, terenkuŝiĝi, stariĝi kaj same rekomenci laŭ la religia ceremoniaro, en la dirita sintenado rilate la preĝejon.

Sur la granda placo, pro suno, estis nemultaj vendistoj, sed tie haltis la karavanoj el kameloj ŝarĝitaj per lano, salo, greno, au aliaj komercaĵoj;

sed sur la stratetoj, iom ombrigitaj, troviĝis butikoj, ho! ege simplaj: Malpuraj kaj disŝiritaj tolaĵoj sur stangoj ŝirmantaj la vendiston kaj la vendotaĵojn kontraŭ fajraj radioj; sed ne kontraŭ la muŝoj. Sennombraj, ili metiĝis sur la viandon, kies iaj pecoj estis tute nigraj. Tamen la Araboj ilin prenis, rigardadis laŭ sperta mieno, ne ŝajnante vidi la muŝaron zumantan ĉirkaŭ, kaj ilin aĉetis.

Kiom da kuriozaj pentraĵoj montriĝas ĉiupaŝe, kiam oni vizitas tiujn regionojn.

Sed mia pli bona impresado de tiu tago, kaj ĉiam neforgesebla, estas la reiro Biskra'on dum la Suno subiris je la vastega ebenaĵo kuŝanta inter la du urboj kaj oazoj.

La malproksimaj montoj, la sablaj montetoj, la ĉielo vestiĝis per koloroj tiel variaj kaj strangaj, ke oni apenaŭ kuraĝas priskribi tian vidaĵon. La rozaj, bluj, violaj tonoj, ĉu palaj ĉu malpalaj, interfandiĝis dum ora polvo envolvis la Biskra'an oazon, altiĝis en la ĉielo kaj nesentebles intermiksiĝis kun la bluo de l' lazura arkaĵo.

Ĉio silentis kaj ŝajnis al mi kaj al miaj gekunuloj



Ĉe SIDI-OKBA.
La granda placo.

ke ni estas la solaj vivantaj estaĵoj en la majeste bela vastega spaco.

BLE DAMANTO.

POR LA PROPAGANDO.



— Kio est'as vid'ebla sur la apud'a ilustraĵ'eto?

— La ilustraĵ'eto prezent'as arab'a'n tomb'ejo'n.

Ĉe ĉiu ekstrem'aĵo de arab'a tomb'o star'as ŝton'o, kies form'o ofte simil'as hom'a'n profil'o'n kaj en kiu est'as gravur'it'aj arab'liter'e sur'skrib'o'.

La arab'a'j tomb'o'j ne kuŝ'as regul'e sam'e kiel en la eŭrop'a'j tomb'e'j'o'j: ili est'as fantazi'e lok'at'a'j, kaj inter ili kresk'as laŭ'vole palm'o'j kaj ali'a'j en'land'a'j arb'o'j kaj arb'et'o'j.

— Sen'dub'e pro tio tia'j tomb'e'j'o'j ne est'as mal'ĝaj'a'j kiel la eŭrop'a'j?

— Efektiv'e; eĉ ĉiu'vendred'e, ili est'as kun'ven'e'jo por la vir'in'o'j, kiu'j ili'n vizit'ad'as kun'port'ant'e mang'aĵ'o'j'n, akv'o'n kaj flor'o'j'n. Ili long'e babil'ad'as, rid'as, kio kred'eble ĝoj'ig'as la spirit'o'n de l' mort'int'o'j.

« TRA LA MONDO. »

Oni proponu tiun tekston por traduki al personoj kapablaj interesi je Esperanto, donante samtempe la gepatralingvan « Slosilon de S^o Ĉefeĉ » (vidu anoncon).

(1) Sidi = Sinjoro.

(2) Marabut'o = Sankta homo aŭ araba pastro, kies tombo i'as, post lia morto, sankta loko kaj, periode, pilgrimejo. Ofte vizito kaj besta ofero havigas edzon al fraŭlinon aŭ igas fruktoporta seninfanan virinon. Tiaj kredoj aŭ superstiĉoj ne ekzistas nur ĉe Mahometanoj!

(3) Moskeo = Musulman'a preĝejo.

MALGRANDA KORESPONDADO

S^o Maurice David (*Francujo*). -- Mi ricevis viajn fotojn; nun, kaj tuj kiam eble, mi povos enpresi vian artikolon. Tre volonte mi akceptas viajn afablajn proponojn por aliaj industriaj artikoloj.

S^o G. Vasiljev (*Rusujo*). --- Ni ricevis vian monon. Via abono estas nun pagita ĝis junio 1907 Brave! Povu ĉiuj legantoj imiti vian rapidiĝon pagi sian reabonon.

S^o J. Lundgren (*Svedujo*). --- Dankon pro

vijaj kuriozaj artikolo kaj desegnaĵoj pri «*Runoj*».

La «*Verda Stelo*», junula klubo, interŝanĝas P. K. kun junaj Esperantistoj ĉiulandaj. Sin turni al S^{ro} Bord, Beaune (Côte d'Or), France, por ricevi adresojn.

S^o J. A. Ouellet (*U. Ŝ. A.*) --- Tuj kiam la 1906^a eldono de «*Tutmonda jarlibro esperantista*» estos aperinta, vi ĝin ricevos. Kredeble ne antaŭ 3 monatoj.

S^{oj} Finot (*Francujo*); Booth (*Aŭstralujo*); Hulanicka (*Polujo*); Radvan Ripinski (*Rusujo*); Mezzini (*Italujo*). --- Dankon pro viaj interesaj artikoloj, kiujn ni presos.

S^{oj} Svačina (*Bohemujo*), Kabanov (*Rusujo*). --- Same pro viaj ilustritaj skriboj.

S^o Hulanicka. --- La vorto *parkere* ekzistas en vortaroj.

A. M.

“Tra la Mondo” kaj la propagando.

S^o Federico Villaréal, nia konata kunbatalanto, samtempe tre fama Perua scienculo, afable skribis al ni tuj post ricevo de sia abono.

«*Hodiaŭ mi ricevis la kvin unuajn numerojn de «Tra la Mondo» kaj, vidinte ĝian gravecon por la propagando, mi sendas per la poŝto al via administranto kvardek ok frankojn por ses abonoj.*

Mi intencas disdoni vian bonegan revuon ilustratan inter kluboj kaj societoj por ke ili konu la progreson de nia afero. Ankaŭ mi pensas diri ion pri via revuo en «*Antaŭen Esperantistoj*» kaj en «*Revista de Ciencias*».

Kompreneble, tia konsento pri graveco de «*Tra la Mondo*» por la propagando tute ĝojigis nin, kaj ni nur bedaŭras ke tia farmaniero ne estas pli ofta.

Aliparte «*Jodolfur*», Islanda gazeto, enpresis en la 25^{an} Januarano N^{on} longan artikolon inspiritan de la letero de S^o Poljaŝkij pri la malpacoj en Odessa, kaj alian pri la artikolo rilatanta la islandan poeton Matthias Jochumsson.

Ni citu ankaŭ «*L'Hérault*» kaj «*Il Cittadino Italiano*», kiuj regule enpresas nian enhavon.

Nia kunfrato «*Esperanto*» franca insistas pri la graveco de l' rezultatoj akiritaj de «*Tra la Mondo*» apud la administracio de l' Poŝtoj kaj Telegrafoj, kaj la deputito, S^o Schneider.

Tiuj faktoj instigu niajn legantojn konigi sian revuon

Lasthore, ni legas fine en «*Lingvo Interna-*

cia» ke «*Nemzeti Iskola*» (Nacia Lernejo) sciigis al siaj lernantoj, laŭ «*Tra la Mondo*», la decidadojn de la unua internacia kongreso de ĝeinstruistoj, rilatanta la akcepton de Esperanto por la estonta Federacio de ĝeinstruistoj.

Ni vidis plezure, en la sama revuo, ke la raporto pri «*Tra la Mondo*» donas nun pli bonan ideon pri ĝia enhavo. Ĝis nun estis iom malfacile vidi ke la revuo estas multilustrata. Dankon al la redaktoro por tiu justa ŝanĝo.

A. M.

Reklamoj — Anoncoj — Avizoj.

Ofte personoj petas de ni enpreson de anoncoj, avizoj, reklamoj, k. t. p.... tute forgesante sendi la necesan sumon. Estas tute neeble plenumi tiajn dezirojn.

Ni ankaŭ rememorigas ke oni devas sendi poŝtmarkon kun leteroj postulantaj respondon, kaj ankaŭ necesajn transsendajn kaj poŝtajn kostojn kun mendoj de libroj.

Ilustrataj revuoj ricevataj.

Ni ricevis de kelkaj landoj ilustratajn revuojn. Ni tre dankas la afablajn sendintojn. Tiu ricevo povos doni al ni ideojn utilajn kaj tiel utiliĝi por ĉiuj niaj legantoj.

La Bona Pomvino

estas ege trinkinda! Ĝiaj gustume konsumantoj estas multaj, ĝiaj prave konsumantoj devus esti ĉiuj la aliaj, ĉar la drinkantoj de bona pomvino neniam timas la malsanadojn tiajn, kiaj la urina sablero, la gravelo kaj eĉ la podagro aŭ la reŭmatismo.

Sendadoj en ĉiujn landojn. Petu prezaron kaj sendmanieron al la «*Cidretrie de Tabago*», St-Nicolas de Redon. Loire inférieure. France.

Esperantaj slosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj «*vortaron ebligantan tuj kaj senprepare decifri kaj legi ĉion esperante skribitan*» Emmetablaj en leteron sen pliigo de la poŝtkosto.

Jam estas pretaj la angla, germana, franca, itala, sveda, hispana, eldonoj kaj riceveblaj po

3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

Les Annales politiques et littéraires.

Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris. Abono: 10 fojojn repagita per la profitoj de l' «*Carnet de la mutualité des Annales*» (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

BALDAU.

Albumo de konataj Esperantistoj.

Ĉirkau cent portretoj, kun biografieto: 2 fr.

Ĉe S^o Schueck, Braunschweig.

Thomaestrass, 16 (Deutschland).

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

L'ESPÉRANTISTE.

France kaj esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate). Redaktata germane kaj esperante. JARA BONO: 3 f. 75. Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzen strasse.

ESPERANTO.

(Ĵurnalo): France kaj esperante. Unu numero 10 cent., 24 noj sinsekvaj 3 fr. Ĉe So Paul Berthelot, Cérêt, P. O., France. Tre rekomendinda al franclingvaj samideanoj. Aĉetebla en ĉiuj stacidomoj kaj ĉe l' kioskoj por vendado de ĵurnaloj.

SUNO HISPANA.

Hispane kaj esperante. Tre grava monato revuo por la propagando de Esperanto en hispanlingvaj landoj, bonege redaktata sub direktado de A. Jimenez Loira. Rakontoj pri hispanaj kutimoj kaj tradukoj laŭ famaj hispanaj aŭtoroj. Abono 3 fr., unu numero 30 cent. Administracio kaj redakcio: Avellanias, 11, presejo — Valencia (España).

ESPERO PACIFISTA.

Monato organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono (aŭ minimuma kotizo al la Societo), 5 frankoj. Krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas konsiderataj kiel aliĝintoj al la Societo; tiu ĉi akceptas aliĝojn opajn. Sin turni al Sro Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

THE BRITISH ESPERANTIST.

oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

MEKSIKA LUMTURO.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Meksika societo por propagandi Esperanton.

Eliras 6 fojojn jare — 3 frankojn — Ĉe Do A. Vargas, Santa Rosa Necoxtla (Ver), Meksiko.

SVISA ESPERO.

France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

Sendu mendojn kaj anoncojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de Tra la Mondo », 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 10^a de ĉiu monato, por la venonta numero.

ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBU.

GÉRANT : EUGÈNE CAPÉ.

LINGVO INTERNACIA.

Monata esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto.

Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komencigo de ĉiu monato.

ANTAŬEN ESPERANTISTOJ.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro, Calle Lártiga, Lima (Peruo).

ESPERANTISTEN.

Svede kaj esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stokolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

3 fr. 75 ĉiujare; aparta No: 35 cent.

ĈILIO ESPERANTISTA.

Senpaga organo propaganda, hispane kaj esperante.

Ĉe So L. E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1989 (Santiago-Chile).

ESPERANTO.

Hungare kaj esperante. Scienca kaj literatura.

4 fr. ĉiulande. Ĉe So Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

RUSLANDA ESPERANTISTO.

Ĉiumonata organo de la S-to «Espero» en lingvoj Esperanta kaj parte en rusa — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemo de lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperanta movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio; sociala politika fako; novaj famaj beletristikaj (interalie en 1906 j. estos presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj mult. al. — La detalaj prospektaj estas riceveblaj, senpage. — La jara abonpago (kune kun membriĝo en la S-to «Espero») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, St. Peterburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S-to «Espero.»

ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo por blinduloj per esperanta Braille'a sistemo, 3 f. — Ĉe So Cart, 12 Rue Soufflot, Paris.

ESPERO KATOLIKA.

Tute esperante. Unu No afrankita 0 f. 30 Francujo, 2 f.; alilande 2 f. 50. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

La plume Sténographique de France.

Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — Dro L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiustistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.



ĴUS APERINTA!

FRANÇOIS COPPEL

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE
AUGUSTE MOXTROSIER



PREZO: 75 CENTIMOJ

PARIS
ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO
23-25 PASSAGE CHOISEUL, 23-25
M DCCCXCV

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidajoj de Alĝerio;

1 fr., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo », fr. 1,50 ĉiu cento.

ĈE « TRA LA MONDO ».

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.